

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

Ĉi-numere legu pri:
ESPERANTO FARIĜIS 120-JARA
MURMURO EL RASTUŠJE
92-a UK EN JOKOHAMO
7-a KONGRESO DE EŬROPA
ESPERANTO-UNIO EN MARIBOR
ESPERANTO - MIA AKOMPANANTO
RIJEKA FESTOS 100-JARIĜON

3

2007

Kekaj kroataj esperantistoj en la
7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio
en Maribor  Josip Plečič

RESUMO

Ŝajnas, ke ni vivas en tempo de multaj jubileoj de Esperanto: jen ni festis la 120-jariĝon de la Lingvo Internacia, jen ni pretiĝas por festi la 100-jariĝon de Esperanto en Rijeka, jen post unu jaro festos sian 100-jariĝon la nacia Esperantomovado en Kroatio samtempe kun 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio. Finnoj jam festis la centan jubileon, aliaj nacioj prepariĝas por tiu granda dato. Pri tiuj aferoj ni provis skribi ĉi-numero: sukcese aŭ malpli sukcese.

La someraj travivaĵoj ĉe ni vekas apartan simpatian. Ne konante detale la movadon, ni ofte pensas, ke ĉio okazas nur al ni mem, sed evidentas, ke ni ĉiuj uzas tre ofte la internaciajn ligojn, ke ni vojaĝas, ĉi-somere eĉ al malproksima Japanio. Kvankam ne ĉiuj raportoj ankoraŭ atingis nin, ni havas manplendon da priskriboj, raportoj kaj informoj, kiuj proksimigos al vi la vivantan organismon de Esperantujo.

El la landa vindpunkto, ni menciis kelkajn gravajn datojn, sed aparte la grandegan perdon - forpason de unu el la plej grandaj kroataj poetoj, kies unuaj alilingvaj tradukoj estis ĝuste la Esperantaj tradukoj. Dragutin Tadijanović forlasis nin estante 102-jara.

Nia revuo, almenaŭ laŭ viaj retmesaĝoj, leteroj kaj telefonvokoj, vekas jen simpatiojn, jen provokas diskutojn. Parton de viaj reagoj ni publikigas, esperante, ke niaj tekstoj restis en kadroj de komune akcepteblaj reguloj de bona konduto. Ni celas esti bona informilo, en kiu, pro nura neprovoko de disputoj, ni ne rifuzos publikigi ankaŭ la negativaĵojn de nia movado. Por atingi tiun celon, ni invitas vin reagi al niaj tekstoj, ĉar nur per viaj reagoj ni povas fiksi la redaktan strategion.

Ĉi-numere ni atingis 8 plenkolorajn paĝojn kaj retenis la 32-paĝan kajeron, pro kio fine de la jaro sampreze vi ricevos preskaŭ unu plenan numeron pli ol ni promesis! Pro la abunda materialo, ĉi-numere ni devis rezigni publikigi plurajn viajn tekstojn, pro kio ni petas vian pardonon. La publikigo estas nur prokrastita. En kazoj kiam ni plene rifuzas publikigi, la aŭtoroj ricevos apartan personan mesaĝon.

Ni sukcesis funkciigi apartan retpaĝon de nia revuo, kiu, verdire, ankoraŭ estas nesufiĉe riĉa, sed ĝi jam atingis pli ol cent vizitojn. Bonvolu viziti ĝin, komentarii kaj atendi novajn enhavojn ĉe: <http://zagreba-esperantisto.blog.hr>

Kvankam ĉi-jare sen nacia Esperanto-kongreso, ni invitas vin ĉiujn renkontiĝi en Rijeka dum novembro, kie ni ĝojigos vin per la lasta ĉi-jara numero de "Zagreba Esperantisto".

La redaktoro

Eldonanto:

Grafokom, Đurđevac

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

*Radenko Milošević
Goljak 43, HR-10000 Zagreb
Kroatio*

Redaktejo kaj ekspedejo:

*Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr*

Redakcianoj:

*Marica Brletić, Snježana
Habulin, Vida Jerman, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin*

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro). En 2007 aperos kvar numeroj.


Jarabono por 2007:

en Kroatio: 50,00 kunaoj
al ĝirkonto de "Grafokom"
2360000-1100925404

alilande: 10,00 eŭroj
al UEA-konto: plea-k

Viajn tekstojn sendu al nia retadreso ĉi-sube, aŭ al la persona adreso de la redaktoro.

Retadreso: zagreba.esperantisto@gmail.com



Maldekstre: d-ro Zamenhof en sia laborĉambro.

Malsupre: Titolpaĝo de la Unua Libro.
Plej malsupre: Strato Nowolipie kun la presejo Kelter.



Miloj kaj miloj da esperantistoj en ĉiuj partoj de la mondo, ĉi-jare, pli precize: la 26-an de julio, celebris la maloftan jubileon: 120-an datrevenon de la Internacia Lingvo Esperanto.

Ni rememoru, ke dum monato julio de 1887, d-ro Zamenhof publikigis lernolibron de sia lingvoprojekto, kiu nun estas konata kiel "Unua libro".

Kiel rapide evoluis la projekto de Zamenhof dum la unuaj jardekoj de sia ekzisto, plej bone ilustras la unua kongreso de esperantistoj okazinta en la franca urbo Boulogne-sur-Mer, kiam la unuan fojojn 688 esperantistoj venintaj el diversaj landoj, parolis sen interpretistoj. La kongreso okazis en la jaro 1905, kaj nur tri jarojn post ĝi estis fondita Universala Esperanto-Asocio, kiu sian unuan jarcenton da ekzisto festos per solena kongreso en la hodiaŭa sidejo - en la nederlanda urbo Roterdamo. La fondo de UEA koincidas kun fondo de la unua tutlanda organizaĵo de esperantistoj en Kroatio.

La Unua Libro estis verkita sub la pseŭdonimo "d-ro Esperanto", pro kio ankaŭ la lingvo mem poste ricevis sian nomon. Ĝi estis verkita en la rusa lingvo kaj presita en la varsovia presejo Kelter (en la strato Nowolipie n-ro 11). Jam antaŭ la fino de la sama jaro aperis ankaŭ eldonoj en aliaj pli grandaj lingvoj: pola, franca, germana kaj angla. La ruslingva Unua Libro enhavas 947 vortradikojn.

Ĉar la apero de la Unua Libro signifis publikan elpaŝon de la ĝis tiam nekonata lingvoprojekto, plenrajte la esperantistoj akceptis tiun daton kiel "naskiĝdaton" de la lingvo, kiun multaj elektis kiel sian vivkoncepton.

Nuntempe, kun plena fiero ni diru: "Feliĉan 120-an naskiĝtagon al vi, Esperanto!"



MURMURO EL RASTUŠJE

Dragutin Tadijanović

(4-a de novembro 1905 - 27-a de junio 2007)



Kiam la 13-an de decembro 2005 (mi ne povas erari: la daton en la librodediĉo skribis Tadija mem) en Đurđevac, en sia, kiel li diris, lasta gastado, li finis celebron de sia 100-a naskiĝtago, mi pensis pri tio, ke al kroatoj okazis miraklo: en tempo kiam estas glorataj juneco kaj forto, beleco kaj frenezeco, kroata heroo fariĝis maljuna poeto. Tio, kio cetere estas marĝena, fariĝis evento pri kiu kroatoj miris, ĝin admiris kaj adoris. Kompreneble, ĝenis min tiu atrakciaĵo, flaveco, cirko-aspekto, sed mi havis la impreson, ke ĝi direktas nin al veraj valorajoj: la pasinttempaj civilizoj aprezis siajn Nestorojn; ilia saĝo estis vivograva, de ili oni lernis kaj iliajn konsilojn oni estimis.

Tadijanović la samajn valorojn senĉese enteksadis en siajn versojn. Ne, li estis nenia panegira versanto, nek instruanto. Sed, la pozicio de poeto, kiu sian vivon preskaŭ taglibre notas per versoj kaj poste prezentas al la publiko: kun doloroj, malĝojoj kaj ĝojoj (fakte tute kutima vivo!), estas elekto kiu instruas; ne gravas esti heroo - heroaĵo estas esti homo, vivi malgraŭ malvenkoj kaj malfortajoj, konfesi ke en nia brusto batas koro: kunsentema, enamiĝema, amikema kaj timema. Tion donis al ni la ekzemplo de Tadijanović: neniam

 Zdravko Seleš

 Zdravko Šabarić

apartajn piruetojn faradis lia vivosorto, neniam limajn spertojn li povis al ni oferti. Sed tamen, li ofertis al ni kiel perfektan lirikon - lirikan sentadon de la mondo kaj de si en la mondo - tion, kio la vivon faras pli bela kaj pli bona.

Pri kio do, kaj kiel li poeziis? Ĉio jam estas dirita, esplorita kaj skribita. (Kaj tradukita, ni diru. Fakte, la unua libro de liriko de Dragutin Tadijanović en franda lingvo aperis en Esperanto, eldonita de la tradukinto Josip Velebit ankoraŭ en 1936, sub la titolo "Kanto al mia koro"). Tadijanović estas poeto de malkongruo inter la mondo de infanaĝo kaj naskiĝregiono, (kiuj, samkiel ĉe la plimulto, formis lian plej profundan estaĵon) kaj la urba vivo, esence diferenca de la kampara ambiente de Rastušje, vilaĝo konata kiel devenloko de Tadijanović. Liaj plej konataj poemoj fontas el tiu malharmonio, pri kiu la poeto mem decidis: reveno al vivmaniero de siaj antaŭuloj estas nur nerealegebla revo kaj el ĝi fontas malĝojo de la nuntempo, rememoro pri bildoj de la forpasinta feliĉo kaj multaj poemoj: "Mi ĵetas la koron sub fremdajn plandojn", "Foras de mi la plugkampoj", "Suno super plugkampoj", la malfrua "Sojlo de la infanaĝo" kaj multaj aliaj, eĉ lia plej konata poemo "Longe dum nokt', dum vintra blanka nokt'", samkiel la mirinda "Vespero super la urbo", en kiu je tute nekredebla maniero deklariĝas tiu, preskaŭ neniam ĝisfine feliĉa koro.

Jen, do, feliĉa ekzemplo. Poemo en kiu la loko aperas jam en la subtitolo, por klare signi la okazejon (Florenco, Piazzale Michelangelo), malfermiĝas per nekutimaj versoj, sternas la nekutimajn sentojn kaj travivaĵojn antaŭ nin. Ni atendus, samkiel la poeto mem

*(Ĉi nokte vi rigardas kiel en Arno reflektiĝas vico da lampoj
Florencaj. Ĉu ne pri tio vi delonge revis
En infanaĝo, dum super la kapo
Trembrilis steloj, en vitejo?)*

entuziasmon pro la loko pri kiu jam kiel knabo li revis, sed anstataŭ tio la koro estas katenita:

*"Kio katenas vin, koro mia, por ne ekvorti el profundo
Kiel orgeno kaŝita en nigra nokta foliaro?"*



pensoj pri Michelangelo estas inunditaj per pensoj pri la patrino kaj fratino, pri la hejmo "kiun forlasis viraj manoj", la manoj de Michelangelo alvokas ekpenson pri nekonataj manoj kiuj falĉis "mian kampon", tiun saman, kiun li forlasis, en kiu lin "eble (min) en Rastuŝje atendas feliĉo kaj kvieto", simpla kaj peza vivo "kun manoj malpuraj pro humo/ mi viŝos ŝviton de l' frunto", pro kiu la homo estas laca, kontenta kaj forte dormanta ("Mi ŝatus rompi kordojn"). Dormo kaj kvietiĝo estas nur deziro ("Dormu, koro mia. Vento, kaj oro, kaj ostoj./ Kaj cindro. Dormu."), kaj en la poeto fakte regas malkvieto, maltrankvilo, sentoj kiuj al li ne permesas ĝui la belecojn de Arno kaj Florenco.

Nature, ĝi estas la koro mem de la liriko de Tadijanoviĉ. En longa viv- kaj poeta epoko, li verkis ankaŭ aliajn kaj alispecajn poemojn, sed kaj la feliĉo kaj malfeliĉo fontis el Rastuŝje, aŭ estis mezuritaj per revado, feliĉoj kaj amoj de knabo el Rastuŝje. Ekzemple, antaŭ longa tempo en Rastuŝje en 1923, naskiĝis jena poemo:

Altaj flavaj grenoj


Kiam en aŭrora ruĝo
aŭ en klaraj matenoj
Mi pasas
Tra rosaj kampoj
Kie juna vento lulas pezajn spikojn
De alta flava greno,
Subite mi haltas;
Kaj, jen!
Mia koro, pro ĝojo, laŭte batas
Kiel orhorloĝo.

La 18-jara poeto jam tute klare sciis, ke la feliĉo estas simpla afero. Simpleco estas unu el la esencaj karakterizaĵoj de Tadijanoviĉ. Verdire, ĝi iam estas nur trompo: ĝi fontas el arkitekturo de la poemo, el siaspeca aŭtora naivisma optiko; lia libera verso kaj konfesia tono faras tian impreson,

"Ĉiu kapablas, mi scias, ĉi tiel verki. Mi petas,
Ne riproĉu al mi ĉar vi legas ĝuste miajn
Modestajn vortojn, delonge konatajn, kompreneblajn."
(Kvazaŭ estus nek mortaj, nek vivaj, neniu),

sed jam la sekva verso en la sama poemo ("La poemo jam komenciĝis, se mi ne eraras.") atestas pri la aŭtora konscio: ĝi atente elektas, imitas esprimon de buŝa komunikado, sed ĝi fakte estas moderna, kaj per si mem komplika. Tiujn, kiuj ne kredas al mi, mi direktas al ekesto-ludo de la poemo kun similaj referencoj kiel tiuj menciitaj en la poemo "Sankta Ožbolt kaj alta arbo kun branĉaro en la ĉielo".

Antaŭ mi, surtable, estas portreto de la poeto - vigla rigardo, klaraj okuloj; bona observanto kaj aŭskultanto, kaj libro kun aŭtogramo, kiun mi menciis en la komenco ("Naŭdek naŭ poemoj kaj ankoraŭ unu", *Ŝkolska knjiga, Zagrebo, 2004*).



Zdravko Seleš, Božica Jelušić kaj Dragutin Tadijanoviĉ

Mi povus ankaŭ aŭskulti sonregistraĵon de tiu renkontiĝo, kiun mi mem faris. Sed, tion mi ne bezonas. Eĉ nun mi povas aŭdi lian voĉon, reciti "**Longe dum nokt', dum vintra blanka nokt'**" imitante lian melodion. Kaj mi kredas, ke ankoraŭ longe mi tion povos, samkiel en la antaŭlasta poemo de la poemkolekto, verkita la 22-an de februaro 2003, en la poemo "**Matenmanĝo**", en kiu la lirikaĵoj konstruiĝas el negravaj bagatelajoj

"Mi mem preparas al mi matenmanĝon
Jam de kelkaj jaroj. En kuirejo
Fojfoje mi diras al ĝi: Kuirejeto. (...)
Plej karaj estas temperoj kiam la lakton
Mi verŝas en ĉinan tason Made in China
Kaj kiam mi sidiĝas ĉetoble kaj manĝas:
Trinkinte kun la unua gluto Euglucon,
Kun la lasta mi trinkas B-komplekson
Kaj ambaŭ Duovit-ojn, kaj venas al mi, miadire,
La plej kara momento: sub akvoŝluo mi lavas
La ĉinan tason, kaj mi aŭdas,
Ĉiufoje mi aŭdas murmuron de roĝo el Rastuŝje,
En junaj jaroj, kaj mi remetas la tason
Sur ĝian lokon, kaj prenas horloĝon, malŝaltas lumon.
Kaj tiel ĉiutage, kaj tiel ĉiutage."

kaj mi kredas, do, ke ankoraŭ longe mi memoros, kiel membris Tadija: en maljunaj jaroj tiu murmuro de roĝo el Rastuŝje el junaj jaroj estis ĉiutaga eta feliĉo, revoko de la pasinto. Kaj tio, kion el la pasinteco ni tiel vivece rememoras, ne estas morta. Tion al ni instruas ankaŭ Proust, kaj ankaŭ la percepto-teorio de Ernst Mach asertas, ke la homoj vivas tiom longe, kiom longe ili estas enhavo de ies konscio, respektive dum vivas rememoro pri ili. Voĉo kaj poemoj de la poeto el Rastuŝje efektive vivas en multaj homoj, murmuris poeto puto melankolie kaj freŝe, gardante memoron pri Tadija, forlavante ankaŭ el niaj vivoj polvon kaj realecon kaj farante ilin materio por revoj kaj ludoj. Dankon al Vi, Tadija, dankon!



7-a KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO (Maribor, Slovenio)


 Zlatko Tišljar

 Josip Pleadin

Inter la 28-a de julio kaj 4-a de aŭgusto okazis la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor, Slovenio. Partoprenis 256 personoj el 29 landoj (23 eŭropuniaj plus Kroatio, Serbio, Rusio, Ukraino, Kanado kaj Togo). Dum la fermo la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, Seán Ó Riain diris, ke la kongreso plenis je unuafojaj unikaĵoj. Unuafoje partoprenis en Esperanto-arango eĉ du anoj de Eŭropa Parlamento: Małgorzata Handzlik (Pollando) kaj Ljudmila Novak (Slovenio). Unuafoje parton de Esperanto-kongreso kunfinancis Eŭropa Komisiono, ĉar parto de la kongreso estis konferenco kun la titolo “*Interkultura dialogo kaj komunikado*”, en kiu prelegis dek fakuloj, kiujn aŭskultis mezume po cent personoj. Krome, laŭ li, unuafoje ĝenerala Esperanto-kongreso havis ĉeftemon, kiu ne rilatis al lingvo kaj kulturo, sed al rekte ekologia temo: **Akvo**.



Eblis gustumi la verdajn Esperanto-bieron kaj Esperanto-glaciaĵon. Jen la ĉefa organizanto Zlatko Tišljar kiu praktikas la oferton.



Reago de informmedioj neesperantistaj pri la kongreso kaj Esperanto estis ekstreme granda: la tutlanda televido dufoje raportis pri la evento kaj 3 lokaj televidoj havis 5 raportojn. Tutlandaj kaj mariboraj radiostacioj havis pli ol 30 elsendojn pri Esperanto, de kelkminutaj ĝis grandaj duonhoraj. La tagĵurnalo de Maribor, *Večer*, havis sep artikolojn kun koloraj fotoj pri kongresaj eventoj (du el ili estis preskaŭ tutpaĝaj), la ĉefa tutslovena tagĵurnalo *Delo* raportis dufoje kaj *Dnevnik* unufoje. Baze de

la informo de slovena novaĵagentejo STA aperis en elektronikaj medioj dudeko da artikoloj kaj en diversaj lokaj medioj plurdeko.

Okazis ses prelegoj rilataj al la ĉeftemo “Akvo” kaj faka ekskurso en kiu pli ol 50 interesitoj vizitis la akvokondukan sistemon de Maribor sub faka gvido.

Kadre de la konferenco “*Interkultura dialogo kaj komunikado*” prelegis ambaŭ EU-parlamentanoj. Sinjorino **Handzlik** klarigis la lingvan sistemon en organoj de EU kaj kostojn de la multlingvismo, dum sinjorino **Ljudmila Novak** parolis pri neceso fortigi la interkulturan dialogon. Enkonduke ŝi klarigis, ke en sia junaĝo ŝi lernis Esperanton kaj eĉ partoprenis en du TEJO-kongresoj. Dum la akcepto en la urbestrejo ŝi promesis estonte laŭokaze prezenti Esperanton en Komisiono por Kulturo de Eŭropa Parlamento kaj



proponis organizi ekspozicion pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento, kion Małgorzata Handzlik tuj subtenis kaj ili interkonsentis estonte kunlabori pri Esperantaj aferoj en Eŭropa Parlamento.

En sia letero sendita al la kongreso, doktoro Marko Pavliha, parlamentano en la slovena parlamento, promesis transformi la finan dokumenton de la kongreso al iniciato de parlamentano transdonota al la slovena registaro.

La kongreso akceptis finan dokumenton en formo de letero al la slovena registaro, kiu en unua duono de 2008 prezidos Konsilion de Eŭropo. La dokumento havas 5 punktojn inter kiuj estas peto subteni iniciaton de slovaka vicprezidanto Ĉaplovič peti Eŭropan Komisionon aranĝi je interregistara nivelo okupiĝon pri lingva politiko, iniciati fondon de nova fondaĵo en EU, kiu financus malpli granadajn neregistarajn organizojn kiuj havus projektojn subtenantajn edukon pri eŭropa konscio, peti la registaron subteni la iniciaton de Marko Pavliha enkonduki en eŭropajn lernejojn nedevegitan studobjekton "Edukado por eŭropa konscio" kies parto estus lernado de Esperanto kaj peti la registaron uzi en sia informado dum 2008 ankaŭ Esperanton.

La kultura programo de la kongreso estis tre abunda. Prezentiĝis tri teatraĵoj el kiuj du en la operteatro de Maribor. Temis pri teatraĵoj de Saša Pilipović el Kragujevac (Serbio) "Galileo", de Drama grupe de Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo (Kroatio) "Kosma ŝipo Ludoviko antaŭ la muro de la mallumo" kaj spektaklo de franca aktoro Henri de Sabates "Stilaj ekzercoj". Okazis du koncertoj de klasika muziko (orgena kaj piana) kaj 4 koncertoj de amuzmuziko en kiu partoprenis Georgo Handzlik, Attila Schimmer, Solotronik kaj Jomo.

Ni aŭdis ankaŭ mallongan prezenton de la instrumento diĝeriduo de aŭstraliaj indiĝenoj far Dubravko Lapajne. Aparte elstaris altprofesiaj

sinprezentoj de la teatraĵoj de Henri de Sabates kaj de Saša Pilipović kaj same profesiaj koncertoj de Attila Schimmer kaj Jomo.

Tre specialaj aranĝoj estis dum la interkona vespero kiam okaze de la 120-jariĝo de



Portugalaj kaj kroataj esperantistoj dum diskuto en la maribora urba parko.

Esperanto prezentiĝis grandega torto en la formo de Esperanto-flago kiu estis distribuita al ĉiuj kongresanoj. Samtage estis solene publika levita Esperanta flago sur la centra urba Placo de Libereco. Ĉiutage oni prezentis kelkajn filmojn subtitolitajn en Esperanto, kaj la junularo havis apartajn amuz-programojn en la studenta hejmo. Sur la monto Pohorje super Maribor okazis infana kongreseto kun partopreno de 9 infanoj el 5 landoj, kiuj tre profitis de 7-taga restado

en arbaro. La aranĝon gvidis Judita Rey el Kroatio.

Eŭropa Esperanto-Unio havis du kunvenojn de la asembleo en kiu ĝi traktis la raportojn kaj planojn por la estonto kaj decidis atribui apartan agnoskon kaj proklami sian honoran membron sinjoro Etsuo Miyoshi, pro lia eksterordinara kontribuo al diskonigo de Esperanto en Eŭropo. La granda atingo ĉi-jara de EEU estis, ke la EU-fondaĵo por kulturo kaj edukado "Aktiva civitaneco" subtenis la konferencon pri Interkultura dialogo kaj komunikado per eĉ 25.000 eŭroj, verŝajne la plej granda financa subteno fare de Eŭropa Unio al iu Esperanto-organizo.

La sekva kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazos en Esperanto-urbo Herzberg en Germanio (vidu paĝon 85).

Multaj kongresanoj gratulis al la organizantoj pro elstara kongreso (pluraj esprimis la ideon, ke temis pri la plej interesa kongreso en ilia vivo). Mi tiusence speciale dankas al familio Obradović kaj aparte al la sekretariino de la kongresa organiza komitato Vesna Obradović.

La sekva kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazos en Esperanto-urbo Herzberg en Germanio (vidu paĝon 85). Multaj kongresanoj gratulis al la organizantoj pro elstara kongreso (pluraj esprimis la ideon, ke temis pri la plej interesa kongreso en ilia vivo). Mi tiusence speciale dankas al familio Obradović kaj aparte al la sekretariino de la kongresa organiza komitato Vesna Obradović.



Vigla diskuto post prelego de Vinko Ošlak

LINGVA LABIRINTO DE EŬROPA UNIO

(diskutita ĉe la 7-a Kongreso de EŬropa Esperanto-Unio)

 Radenko Milošević

Preskaŭ ĉiuj aŭdis pri labirinto. Labirinto estis laŭlegenda greka konstruaĵo sur la insulo Kreto, kie el multaj interplektitaj ĉambroj kaj koridoroj oni ne povis trovi elirvojon. En la centro vivis la mita estaĵo Minotaŭro, kiu estis duone taŭro kaj duone homo. La legenda greka fabelo rakontas, ke la brava Tezeo mortigis Minotaŭron.

La legenda labirinto povas aspekti finita kaj neprogresanta. Tamen, ĝi estas nesolvebla problemo por tiu, kiu dezirus atingi la celon – eliron. Samtia ŝajnas la lingva problemo de EŬropa Unio, sed ĝi estas nefinita kaj progresanta al multlingva muraro de la labirinto kun ĉiu nova ŝtato eniranta la Union, kaj kun ties popolo kaj lingvo.

Ni akcentu, ke en tiu ĉi momento ni ne parolos ĝenerale pri la tradukcostoj por leĝoj, komparaj statistikaj eldonadoj, kaj pri interpretado de paroladoj ĉe diversaj oraganizaj niveloj de EU. Malgraŭ ĝeneralaj proklamoj, en la ĉiutaga vivo de EU evidentiĝas prefero de la angla lingvo, kiu iom post iom rodetas aliajn lingvojn, sed ne nur tiujn, kiuj apartenas al t.n. lingvoj de malpli nombraj popoloj.

La lingva labirinto de EU respegulas tute alian situation, ĉar ĝi ĉiam pligrandiĝas, ne nur pro aliĝio de novaj ŝtatoj, sed ankaŭ pro neeblaj solvoj por naciaj minoritatoj en unuopaj landoj. La labirintego kreskas senfine kaj progresas, kaj en tiu ĉi momente oni bezonas dudekdu tradukistojn - ambaŭdirektajn. Ekzistas centoj da ekzemploj pri speciala pozicio de la angla lingvo.

Ĉu do la angla lingvo estas Minotaŭro? Per kiaj fortoj ni, esperantistoj, disponas por kontraŭstari ĝin, kaj kiu estos Tezeo mortigonta Minotaŭron? Kiom da paperaj rezolucioj en la mondo kaj en EŬropo estis skribitaj pri solvo de la lingva labirinto?

Deklaracio de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de gepatra lingvo en 2001 apogiĝas al la penso de Gandhi: "Doni al milionoj da homoj (nur) scion de la angla, signifas sklavigi ilin". Kaj ĝuste post EŬropa jaro de lingvoj estis subskribita la t.n. "Zagreba rezolucio" en 2002. Subskribis ĝin multaj reprezentantoj de diversaj fremdaj kulturcentroj kaj diplomatoj de ambasadoj en Zagrebo. Kiaj estas la enhavo kaj celo de la Rezolucio? Ĝi asertas, ke plurlingveco estas baza eŭropa valoro kaj ĝi rezultigos pli grandan demokration. Ĝin oni devas propagandi

samkiel toleremon, plurismon, civilan socion kaj parlamentan demokration. En la unuiginta EŬropo ĉefsupozo por sukceso estas, ke pli granda nombro da homoj parolu laŭeble pli da fremdaj lingvoj! Ho, kia ideo! Anstataŭ pripensi kiom da oficialaj lingvoj jam ekzistas en tia EŬropa Unio, kiom kostas tia situacio, kiom bone oni regas la naciajn lingvojn – kiel solvon oni proponas, ke plejmulto da kleraj homoj enkonstruu en sin mem la lingvan babelan turon.

Ekzistas multegaj esperantistaj rezolucioj taksantaj la lingvan problemon de internaciaj organizoj kaj ofertataj solvoj. Instruindas la pensoj de la irlanda diplomato Seán O' Riain, kiu demandas: "Ĉu la angla jam venkis"? La teksto de Peti Nitobeow ĉe la simpozio en Vilnius (2005) pri "Lingvopolitikaj aspektoj de plilarĝigo de EŬropa Unio" estas instrua. Ĝi tuŝas la "Roman kontrakton" kiu antaŭvidis egalecon de naciaj lingvoj en eŭropaj institucioj, sed tiun principon en la nuna momento kun 27 membroj-ŝtatoj, 23 oficialaj lingvoj kaj pli ol 25 regionaj kaj minoritataj lingvoj, ne eblas egalece plenumi. En la konkluda dokumento oni esprimis maltrankviliĝon pri lingvo-demandoj kun detala priskribo de la lingvaj problemoj speciale pro subfosado de pozicio de lingvoj de malgrandaj ŝtatoj pro la altruda uzado de la angla lingvo. Ankaŭ multaj rekomendoj kaj rezolucioj de landaj Esperanto-asocioj de Meza EŬropo estis publikigitaj en kelkaj pasintaj jaroj.

Kelkvorte ni tuŝu la situation de Kroatio kaj de la slavaj lingvoj uzataj de aktualaj EU-membroj aŭ ŝtatoj-kandidatoj. Jam nun, antaŭ ol la Kroatio fariĝis membro de EU, oni povas aŭdi opiniojn de unuopaj EU-politikistoj. Menciindas la frazo de la konservativa brita eŭroparlamentano Charles Tannock: „Supozeble vi ne intencas nin troŝarĝi kun kostoj de tradukado al bosna, montenegra, kroata kaj serba lingvoj? La landoj de la okcidenta Balkanio devus akcepti unu komunan lingvon!". Kia estis la reago de kroataj lingvistoj kaj sciencistoj kontraŭ tia fiaĵo de la "angla ĝentlemano"? Prezidanto de "Matica Hrvatska" Igor Zidić, komentariis la vidpunkton de la "Kroata akademio pri sciencoj kaj arto", kiu per sia dokumento "Pozicio de la kroata (lingvo) en eŭropaj integriĝoj" atentigas, ke "EŬropo preparas al ni bosnan-montenegran-kroatan-serban lingvon". Li konkludas, ke nun ĉio dependas de la kontaktoj de kroataj registaraj aŭtoritatoj kun la EU-registaro kaj aŭtoritatoj. Unuopaj kroataj lingvaj aŭtoritatoj tro kompleze akceptis la tezon, ke "la lingvo de unuopa membro-ŝtato samtempe estas ankaŭ oficiala lingvo de la Unio", sed aliaj tamen avertas, ke tio dependas de nia rilato al la propra lingvo kaj ĝia rolo kaj apliko ene de la estonta membreco en EU kaj ties lingva problemoj.

Dum iuj, ekzemple la usona lingvisto Robert D. Greenberg, balbutas pri la nuna kaj eksa kodigo de la kroata lingvo, la franca lingvisto



Claude Hagège en la libro: „Halte à la mort des langues“ (Haltigu la morton de lingvoj), maltrankviligita pro la mortado de 25 lingvoj jare kaj zorganta pri lingvodiverseco en la mondo, estas zorgoplena pro la influo de la usonangla lingvo. Li parolas eĉ pri lingvocado! Sciante multon pri la kroata lingvo, li akcentas memstarecon de la kroata lingvo kaj prilumas ĝian liberigon el jugoslavia provo de lingva unuigo. Asertinte pri la plurjarcenta kontribuo de la kroata lingvo al la mondo, li priskribis ankaŭ la destinon de la hebrea lingvo, kiu "resurektis" el mortaj lingvoj. Li skribe kaj parole do batalas por ĉiu unuopa monda lingvo kaj dialekto kiu estas neanstataŭebla specimeno, komparebla kun diversaj reprezentantoj de flaŭro kaj faŭno.

Ĉe la fino ni nepre menciu specialan rolon de la kroata lingvo al kroatoj mem. Dum la epoko kiam en Eŭropo la oficiala lingvo estis la latina, ankaŭ kroataj verkistoj kaj sciencistoj, ekde Ian Pannonius ĝis Ruder Bošković, skribis latine, sed jam en 1506 kroatlingve estis presita en Venecio la libro de Marko Marulić el Split, pri "historio de sankta vidvino Judita, per versoj kroataj kunmetita". Specialaĵo okazis kiam la papo Inocento la Kvara en 1248 eldonis permeson uzi la kroatan en liturgio, kio en la tiama Eŭropo estis unika fenomeno. Sekve, papo Gregorio la Dekkva per dekreto "De propaganda fide" el la jaro 1622 enkondukis lernadon de ilira t.e. kroata lingvo. Tio ebligis presadon en la kroata lingvo.

Tamen, en Kroatio la latina lingvo estis oficiala en la kroata parlamento. Post la kroata parolado de la politikisto kaj historiisto, nobelo Ivan Kukuljević Sakcinski en Sabor (=Parlamento), la 2-an de majo 1843, Sabor anstataŭigis la mortan latinon per la kroata lingvo kaj la 23-an de oktobro 1847 enkondukis ĝin kiel „politikan kaj oficialan lingvon“.

Se en Kroatio per la latina lingvo oni batalis kontraŭ la lingvoj germana kaj hungara, alia situacio estis en la religia kampo. Tie la bazo estis glagolica liturgio en la nacia lingvo (skribita per speciala skribmaniero dum 11 jarcentoj), kiun povis uzi nur kroatoj ĝis la Dua vatikana konsilio en la jaro 1965. La plej malnovaj tekstoj skribitaj per glagolico estis Tabulo el Baŝka (ĉirkaŭ la jaro 1100), transkribo de "Vinodola leĝaro" el 1288 kaj "Misalo" el 1483 presita en Kosinj – nur 25 jarojn post la Guttenberga presmaŝino.

La ĉi-supraj asertoj kaj citaĵoj estu bazo per kiu ni prilumis la situacion de la kroata lingvo, por ke ni taksu lingvojn de majoritatoj, dialektojn kaj lingvojn de minoritatoj almenaŭ kiel valoregan zorgon pri ĉiu specio en la monda flaŭro kaj faŭno!

Finnlanda festivalo ARTA LUMO

27-a de julio -1-a de aŭgusto

 Raita Pyhälä

Al *Arta Lumo*, unu el la eventoj okazigitaj de Esperanto-Asocio de Finnlando en la jubileo jaro omaĝe al sia 100-jariĝo, EAF invitis eksterlandajn kaj enlandajn artistojn kaj artemulojn. La vetero estis belega, kaj komence la fruvenintoj piediris al la haveno de Kuopio por akcepti grupeton venontan per ŝipeto de la monaĥejo Valamo, kie okazis unusemajna Esperanto-kurso kun 12 partoprenantoj ĵus antaŭ la festivalo. Urbo Kuopio situas sur bordo de Kallavesi-lago, kiu, kun aliaj lagoj konektitaj al ĝi, kovras areon de 890 kvadrataj kilometroj. Pro la festivalo aperis turisma broŝureto pri Kuopio-regiono kun kolora foto ĉiupaĝe.

La programo de la festivalo enhavis diversstilajn muzikojn, ekzemple kantojn, fabelojn kaj gitaradon de *Duobla Unu* el Francio, flamenko-stilajn pecojn de *Solo* el Andaluzio, rokbandon *Dolcxamar* el Finnlando, kantojn de noktklubece bela kantistino *Natalia Strihnova* el Rusio, elektran kantelomuzikon de finno *Timo Väänänen*, akompanitan de moderna dancado kaj magiaj lumoj, kaj orgenkoncerton de lokano *Esa Toivola*, konsistantan ĉefe el improvizado laŭ konata himnomelodioj. Li ankaŭ prezentis kiel kaj kial lia instrumenta funkcia. Dum la festivalo ofte kantis kaj deklamis finna rimantino *Anja Karkiainen*, kiu gajnis la unuan premion de poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA 2007.

Krom la koncertojn oni vidis bonhumoran artekspozicion de s-ro *Markku Sarastamo*, kies fabellibro estis Esperantigita antaŭ nelonge: gravuraĵoj, blazonoj el ligno, akvareloj, koloraj statuetoj, "maŝinetoj", ekzemple "pra-poŝtelefono trovita en ĝangalo". Krome, s-ro Sarastamo per ludkartoj prestidigitadis.

Estis montrita malnova filmo (1950-aj jaroj) "Pilgrimo" de la plej konata finna esperantisto *V. Setälä*, *A. Korĵenkov* prelegis pri la Esperantigitaj verkoj de Tolkien, pri Esperanta gazetaro kaj pri la ideologio de L.L. Zamenhof.

Oni ankaŭ ekskursis en la kamparo kaj konatiĝis kun Esperanta bieno, kie oni kultivas centon da specioj da salikoj kaj okazigas kursojn pri vimenplektado. Oni rajtis ankaŭ bani sin en tradicia fumosaŭno, naĝi en lago kaj sidadi varmakve en ligna kuvego, por poste regali sin per freŝa salato, rostitaj kolbasetoj, dolĉaj kukoj, kafo kaj aliaj trinkaĵoj. La etoso de la tuta festivalo estis pli familia ol solena.

ESPERANTO - MIA AKOMPANANTO

 Milan Sudec

(fragmento)

Antaŭ iom da tempo atingis nian redakcion ampleksa teksto, verkita de malnova esperantisto Milan Sudec. Temas pri rememoroj el lia aparte riĉa esperantista vivo. Ĉi-sube ni publikigas ĉapitron el la ricevita materialo, kiu aperos kiel tutaĵo en formo de broŝuro mendebla ĉe nia redakcio. Ĉi tiu ekzemplo estu forta instigo ankaŭ al aliaj multjaraj esperantistoj noti siajn rememorojn, kiuj povus fariĝi grava fonto de historiaj scioj. La kolektita materialo estos publikigita aŭ restos konservita en la arkivejo en Durdevac.

HAMBURGO

Post la Tokia Universala Kongreso de Esperanto, epidemio de kormalsano atakis la Centran Oficejon. Glauco infektiĝis dum restado en Tokio kaj Wily suferis jam de kelkaj jaroj, ekde kiam li renkontis sian japaninon. Mia viruso ne venis de malprosimde - kulpis la kastelo Greziljono (Grésillon). La terapio de tiuj kormalsanoj estis, ke Glauco kaj Wily pakis siajn valizojn, kaj iris al "lando de leviĝanta suno". Mia vojo estis pli mallonga - ĝi gvidis min al Hamburgo.

La rezulto de la epidemio estis, ke dum mallonga tempo la Centran Oficejon forlasis tri oficistoj. Tamen mi devas diri, ke la tri jaroj kiujn mi pasigis en la Centra Oficejo, restos por mi neforgeseblaj.

Dum mia libertempo en Greziljono mi konatiĝis kun kelkaj hamburgaj esperantistoj, kio plifaciligis mian translokiĝon. Ankaŭ la laborproblemo estis rapide solvita. Aktiva esperantisto Hans Schuett estis posedanto de entrepreno kiu provizis horloĝistojn per diversaj horloĝpartoj por riparado de horloĝoj. En lia firmao laboris lia edzino, ankaŭ esperantistino, pro kio dum la labortempo mi ne havis lingvan problemon. Por komenco tio estis granda helpo, ĉar la germana lernita en gimnaziaj jaroj jam delonge elvaporigis el mia kapo.

Mia nova ĉefo estis unu el plej elstaraj hamburgaj esperantistoj. Kiel junulo kelkajn jarojn li vivis en Parizo, kie li partoprenis la faman kabaredon de Raymond Schwartz. Ĝuste plej ofte inter esperantistoj, mi ne multe sentis lingvan problemon.

La lokaj esperantistoj kunvenadis en gastejo, kie ili havis apartan ĉambron, kaj la kunvenoj okazadis unufoje semajne. Tiu gastejo klubejo havis ankaŭ malavantaĝon, ĉar en la apudaj ejoj la "kutimaj" gastoj ofte estis tro laŭtaj post kelkaj bierglasoj. Se la gastejestro konstatis, ke la esperantistoj ne sufiĉe konsumas, li konsilis al ni serĉi alian lokon. Tiu migrado okazadis kelkfoje, kaj

la rezulto estis, ke kelkaj membroj ne povis regule venadi.

Revo pri propra klubejo estis ofta temo. Fondita estis "Brikokaso" por kolekti monon tiucele. Ĉiumonate ni plenigadis la kason, sed la prezoj de konstruaĵoj kaj inflacio estis pli rapidaj. Dum mia restado en Hamburgo la lokaj esperantistoj estis tre aktivaj, kaj ankaŭ mi ne volis postresti. En la jaro 1966 mi edziĝis al fraŭlino kiun mi ekkonis en Greziljono. Pruviĝis, do, ke Esperanto estas ankaŭ "edz-peranto".

Je mia surprizo dum restado en Germanio, mi havis okazon denove renkontiĝi kun la rusa amiko Nikolao Rytkov, tiutempe vivanta en Londono. La hamburga dua televida kanalo faris filmon pri la rusa Oktobra Revolucio, kaj invitis Nikolaon roli Leninon. Dum tiuj okazoj li estis ofta gasto en nia hejmo.

La jaro 1974 estis grava por hamburgaj esperantistoj. Ili ricevis komision aranĝi Universalan Kongreson. Unu jaron antaŭe ni komencis la preparojn. Estis fondita LKK kiun eniris ankaŭ mia edzino kaj mi. Mi ricevis malagrablan taskon fariĝi kasisto. Sciante, ke atendas min multe da laboro, mi akceptis la taskon nur ĉar mia edzino profesie estis librotenistino kiu povus min subteni. Ni estis tre fieraj ĉar la Kongreso okazos en la ĵus finkonstruita Kongrescentro. Ni estis tiuj, kiuj inaŭguros ĝin kiel "provkunikloj", kaj pro tio estis akirita tre favora luprezto.

Du tagojn antaŭ la Kongreso mi subite malsaniĝis. Terurajn dolorojn kaŭzis al mi la atako de apendico. Per aŭto de urĝa medicina helpo mi estis enhospitaligita, kaj ĉar temis pri tre urĝa kazo, mi estis tuj operaciita. La kuracisto poste diris, ke mi havis feliĉon veni lastmomente. La LKK-anoj ekpanikis: kiu transprenos la taskon de kasisto? La solvo estis simpla: mia edzino transprenis tiun laboron, kaj eĉ ne havis tempon por viziti min en la hospitalo.

Agrable surprizita mi estis, kiam venis internacia grupeto por viziti min. Estis samtempe bona reklamo por Esperanto. La lastan kongrestagon mi forlasis hospitalon kaj havis la



okazon ĉeesti la ferman ceremonion.

Pri tiu polemika Kongreso estis verŝite multe da inko. Profesoro Lapenna, tiama prezidanto de UEA, ne estis reelektita, kaj li proklamis, ke okazis organizita "puĉo" kontraŭ li. Opinioj de la plimulto estis, ke dum libera voĉdonado li malvenkis, kaj, sekve, li kondutis kiel malbona sportisto kiu ne povas akcepti la perdon. Poste li forlasis UEA kaj fondis propran "Neŭtralan Esperanto-Movadon", kiu malaperis post lia forpaso en la jaro 1987.

Mi bone rememoras, ke en la jaro 1974 foje alvokis min la kluba sekretario Heinrich Wielgus, kaj ekscitvoĉe diris, ke li havas gravan novaĵon. En lia najbareco estis ofertita por vendo teretaĝa loĝejo, kiu, liaopinie estus tre taŭga por nia klubejo. En ĝi estas lavejo, sed jam de longa tempo ĝi ne funkcias, kaj la posedantino decidis ĝin vendi. La sekvontan tagon ni kunvenis por preparoli la aĉeteblecon kaj esplori la domon. De ekstere ĝi aspektis senmakule, sed interne oni devus multon ripari kaj rearanĝi. Ĝi estis sufiĉe granda, ĝi havis teretaĝon, grandan kelon kaj ĝardeneton.

La kasistino de "brikokaso" diris, ke la kasa saldo estas tre modesta. Do, kion fari? Heinrich proponis, ke inter ni oni kolektu la necesan sumon. Dek klubanoj deklaris sin pretaj donaci po mil germanaj markoj por eniri la negocon. Tiel nia revo pri propra klubejo fariĝis realaĵo.

Bonŝance, inter la klubanoj kaj ties amikoj estis ankaŭ kapablaj metiistoj, kiuj senpage riparadis la domon, kaj baldaŭ ĝi estis preta por societa vivo. La klubejo mem situas tre favore, proksime al la urbocentro kaj metroo. Do, se vi iam venos Hamburgon, ne preterlasu la okazon viziti tiun esceptan klubejon.



Valora foto

Fine de julio ĉi-jare, d-ro Ivo Borovečki el Pula donacis al la arkivejo en Ĵurđevac sep diversperiodajn fotojn kiuj rilatas al Esperanto. Inter ili, la plej valora estas la foto, kiu prezentas la unuan renkontiĝon de kroataj kaj serbaj esperantistoj en Beogrado, okazinta la 10-an de julio 1910. Apud la flago staras konata kroata slavisto kaj esperantisto Josip Badalić, kiu en 1953 la originalon de tiu foto donacis al s-ro Borovečki. Dankon al la donacinto. Lia donaco aparte gravas en ĉi-tiu tempo, kiam estas preparata ampleksa historio de la enlanda movado. Ankaŭ aliaj esperantistoj, kiuj posedas rarajn dokumentojn kaj fotojn, estas petataj almenaŭ prunti la rarajojn por kopiado, aŭ mem fari kopiojn kaj disponigi ilin al la arkivejo.

POŝTMARKO ESTAS SIGNO DE SUVERENECO

Radenko Milošević

Poŝtmarkoj estas signoj de suvereneco, egale de grandaj mondpotencoj aŭ de insuletoj meze de senlima oceano. Poŝtmarko mem estas insuleto en senco de historia aŭ geografia vasteco. Jam delonge ankaŭ esperantistoj, kun sia "mondvasta ŝtato" Esperantujo dediĉas atenton al poŝtmarko kiel simbolo de suvereneco. Per aperigo de poŝtmarkoj ni anoncas nian lingvon kaj niajn ideojn al vasta publiko kiu uzas poŝtmarkojn.

Kiel komenciĝis la vivo de poŝtmarkoj? Antaŭe oni pagadis poŝtajn servojn per mono. Ĉar la servon pagadis la ricevanto de la sendaĵo, okazadis malgrablaj situaciojn, se iu ne volis akcepti la leteron, pro kio la poŝtistoj restis sen enspezo. Al la anglo Rowland Hill naskiĝis la ideo presi malgrandajn konfirmilojn, gluendajn sur poŝtaĵojn. La 6-an de majo 1840 en Britio estis presita la unua poŝtmarko konata kiel "Penny Black" (nigra penco).

En Kroatio, kiu tiam estis parto de Aŭstro-Hungara Imperio, la unua poŝtmarko estis eldonita en la jaro 1850, sekvis ĝin la poŝtmarkoj el 1918 de la nekonfirmata Ŝtato de Slovenoj, Kroatoj kaj Serboj, kaj inter la jaroj 1941 kaj 1945 de Sendependa Ŝtato Kroatio. La unua kroatia filatela ekspozicio okazis jam en 1907, do precize antaŭ 100 jaroj.

La 25-an de junio 1991, kiam Sabor (kroata parlamento) proklamis sendependecon de Respubliko Kroatio, estis eldonita regula poŝtmarko honore al tiu evento. Tiu eldono do aperis pli frue ol Kroatio estis internacie agnoskita.

PRI LA VALORO KAJ KARAKTERO DE ILEI-DIPLOMO DE LA LJUBLJANAJ KURSOJ

 Nikola Rašić

Vi starigas al mi historian demandon pri kiu nur mia memoro povas helpi, kiom ajn trompa ĝi povas esti. Mi nun ne memoras en kiu jaro tio estis (84, 85?) sed tiam ILEI kunlabore kun Univerza Edvarda Kardelja en Ljubljana, nome ties pedagogia fakultato (se mi ne eraras) organizis unusemestran kurson (kelkmonatan, certe) kiu nomiĝis (denove, memoro!) "Postdiploma kurso pri Esperanto-metodiko" aŭ simile. Ĝi do estis destinita por personoj kiuj jam havis ian instruistan aŭ universitatan diplomon, sed efektive oni ne multe zorgis pri tiu fakto, praktike ĉiu esperantisto povis partopreni, kaj do tiel ankaŭ Marija (Belošević, *rim. red.*) kaj kelkaj aliaj sen la universitata diplomo. Janez Jug kaj mi estis tie asistantoj de prof. Szerdahelyi. Ni tiam estis asistaj esploristoj ĉe siaj universitatoj (Zagreb kaj Ljubljana). Efektive ankaŭ ni devintus ricevi tiujn diplomojn, kiel Marija, kvazaŭ honorarion por nia laboro, sed mi ne ricevis ĝin. Laŭ mi, ĉiu pasis la ekzamenon. Estis tio agrabla studado, kiu okazis ĉiun duan semajnfino. Do, en tiu senco ne povas temi pri vera universitata studo, ja tiu devus daŭri almenaŭ dek plenajn semestrojn. Temas do pri unu el pluraj similaj perfektigaj kursoj. Persono kun tiu diplomo rajtas instrui Esperanton, laŭ kriterioj de ILEI, sed estas iom troe pretendi, ke per tio oni akiris universitatan edukon kaj titolon de pedagogo. Por tio necesus fini almenaŭ iun instruistan altlernejon. Mi dubas, ke tian diplomon fakte rekonus iu ŝtata instruinstanco. Mi mem finis universitaton de pedagogia karaktero

kaj faris ĉiujn necesajn ekzamenojn por akiri instruistecon (pedagogio, didaktiko, metodiko k.s.), sed mi neniam nomis min mem pedagogo ĉar mi neniam praktikis instruistan fakon, kvankam mi instruis (ankaŭ Esperanton), eĉ universitatnivele (Zagreb, Ljubljana, San Francisco). Tio do estas iaj ĝeneralaj kriterioj por povi nomi sin pedagogo. Povas esti ke ILEI uzas iujn aliajn kriteriojn, sed tio ne ŝanĝus la esencon: tiu diplomo donas al neniu rangon de diplomita universitatano, kvankam ĝi ja estas pruvo, ke oni finis universitatnivelan kurson pri Esperanto-instruado. Tamen la kompleta kursaro de pedagogo estas almenaŭ dudekoble pli granda.

Ankaŭ mi, pro diversaj kialoj, subtenas oponon al Marija kiel kandidato. Sed, bv. atenti kiel vi aliras la temon. Oni konvinku per argumentoj ne per personaĵoj. Bonaj argumentoj ja ne mankas. Edvige Tantin pravas en tiu senco, ke ŝia kandidatigo estas akorda kun la statuto de UEA: ja ĉiu rajtas kandidatiĝi. Tamen restas la demando kiel funkcias la Elekta Komisiono se oni proponas kandidaton kiu eĉ en sia propra landa asocio ne havas subtenon. Temas pri apliko de simpla prudento, ne nur de la statutaj reguloj. Prudenta UEA kaj ties estraro atente aŭskultas la voĉon de siaj membroj, kaj granda plimulto de membroj de KEL ne trovas ŝin taŭga persono por tiu posteno. Certe restas ankoraŭ sufiĉa spaco por ŝia aktivado ankaŭ ekster la kadro de la Estraro, kiel ŝi faris ĝis nun. Espereble Marija trovos manieron kreive kaj aktive sin engaĝi ankaŭ en la hejma movado kaj kadre de ĝiaj institucioj.



MONUMENTO AL BENEDIKT KOTRULJEVIĆ

 Radenko Milošević

Ĉe la kruciĝo de stratoj Draškovićeve kaj Kneza Mislava en Zagrebo, en majo ĉi-jare la urbestro Milan Bandić malkovris monumenton al Benedikt Kotruljević.

Benedikt Kotruljević (Dubrovnik 1416 – Aquila 1469) estis kroata humanisto, sciencisto, diplomato, negociisto kaj ekonomikisto en la 15-a jarcento en Dubrovnik. Lia originala verko: *“Della mercatura et del mercante perfetto”* (Pri negoco kaj perfekta komercisto) estis la unuan fojon presita en 1458 en la ĉirkaŭaĵo de Napolo. Antaŭ 500 jaroj priskribita maniero de la t.n. "duobla librotenado" estas presita en 1573 per helpo de alia kroato, filozofo kaj sciencisto Frane Petrić. Sen tiu metodo la hodiaŭa negocado estus nerealigebla. Sed avideco de la tiamaj entreprenistoj estis enorma. Ili riproĉis al li, ke tiel oni malkovras zorge garditajn negocajn sekretojn, kaj li finfine devis forlasi la naskiĝurbon.

Inter liaj verkoj troviĝas ankaŭ la unua helplibro pri navigado el la jaro 1464 titolita *“De navigatione”*, skribita tri jarcentojn pli frue ol estis malkovrita Ameriko. La verko skribita en la itala, enhavas ventorozojn, mapojn, luntabelojn kaj priskribojn de geografiaj, astronomiaj, meteologiaj, psikologiaj kaj medicinaj scioj bezonataj por navigadi.



KROATAJ ESPERANTISTOJ PARTOPRENIS ILEI-KONFERENCON EN JAPANIO

✍️ Marija Jerković

La 40-a Konferenco de ILEI okazis inter la 11-a kaj 19-a de aŭgusto en Ranzan, Japanio. Temo de la Konferenco estis "Virinoj en Esperanto-kulturo". Partoprenis sepdek esperantistoj el dudek landoj. Kroation reprezentis Spomenka Štimec, kiu prelegis pri virinoj en Esperanta kulturo kaj Marija Jerković, kiu prelegis pri kroataj verkistinoj kiuj per Esperanto atingis japanan kulturon. Ĉeestis kaj kunhelpis Jagoda Ĉaldarević, Zlata Nanić, Mirjana Žeželj kaj Višnja Branković. En sia prelego Marija Jerković prezentis la vivon kaj verkon de Ivana Brlić-Mažuranić kaj Spomenka Štimec. Dum lingva festivalo Marija Jerković kaj Jagoda Ĉaldarević prezentis kroatan lingvon al la partoprenintoj kaj konigis al ili kelkajn frazojn en la kroata. Ĉiuj kiuj sciis ripeti la vortojn ricevis memoraĵon el Kroatio: korforman kuketon, konatan en Kroatio kiel "licitarsko srce". Tiuj kiuj sciis pli ol unu frazon, ricevis KD-on pri Kroatio. Vestitaj en nacioj kostumoj el la regiono Posavina, dum la adiaŭa vespero Marija, Jagoda kaj Zlata kantis kroatajn kantojn kaj prezentis kroatan dancon. Resume, la konferenco estis sukcesa kaj Kroatio estis tre bone prezentita.



DU SAMLOKAJ RENKONTIĜOJ EN HUNGARIO

✍️ Josip Pleadin

Inter la 21-a kaj 28-a de julio okazis IRIS-festivalo, dum la lastaj tri tagoj (26-a ĝis 28-a de julio) estis rezervitaj por 34-a Hungaria Esperanto-Kongreso.

Kelkajn semajnojn antaŭ la duobla evento svarmis informoj pri la ampleksa planita programo, kiu nur parte sukcesis realiĝi. La festivalaj programoj estis ĉefe por gejunuloj, grandparte amuzkarakteraj. La kongresaj programoj konsistis el prelegoj de en- kaj eksterlandaj prelegantoj. El eksterlando prelegis: Jolanda Józsi (Rumanio), Madis Linnamägi (Estonio), Josip Pleadin (Kroatio), Monica Prezioso (Francio), Boris Arrate (Kubo, fakte Hungario), Terezija Kapista (Serbio) kaj Ben Indestege (Belgio), dum la hungaraj prelegantoj pli multnombri: Imre Szabó, Enikő Sné Zengő, Péter András Rados, Géza Schuller, Anna Bartek, Róbert G. Nagy, Perla Miela, József Baksa, d-ro György Flender, Katalin Faragó. Mirinde, la organizantoj sukcesis fari aranĝo(j)n, kie multaj partoprenintoj havis senpagan loĝadon kaj manĝadon. Pri la eventoj raportis hungaraj informmedioj, ekz. dufoje la loka gazeto "Zalai Hírlap" (la 27-an kaj 28-an de julio). La aranĝoj, laŭ tiuj informoj, sukcesis venigi al Zalaegerszeg ĉirkaŭ 250 geesperantistojn. Gratulon kaj bonan sukceson estonte!



OMAĜE AL LA CENTJARIĜO DE ESPERANTO EN RIJEKA

 Radenko Milošević

Ŝajnas nehazarde, ĝuste en Rijeka estis fondita la unua Esperanto-societo en Kroatio. La urbo-haveno Rijeka kun sia ĉirkauaĵo havis dum jarcentoj apartajn historion kaj sorton. La unuan fojon ĝi ricevis sian aŭtonomecon en 1719 kiam ĝi fariĝis libera haveno per decido de la aŭstra caro Karolo la Kvara. Dum la carino Maria Teresia, proklamita per "pragmata sankcio" de la kroata Parlamento reĝino de Kroatio, estis fondita "corpus separatum" kaj ĝis la jaro 1924 Rijeka estis pli-malpli memstara. Tiam pozicion ĝi perdis dum la regado de banuso Jelačić en 1848, sed ricevis ĝin en 1868. En la tempo de Aŭstro-Hungara Imperio la politika kaj administra roloj de Rijeka estas tre suspektindaj. Paperpeco gluita sur originalnon de la "Kroata-hungara interkonsento" (1868), nomita "Fliko de Rijeka" fariĝis aldona artikolo 66, kio kaŭzis rektan hungaran administradon kaj hungarigon de Rijeka kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Post la unua mondmilito kaj disfalo de Aŭstro-Hungara Imperio, la pozicio de Rijeka fariĝis internacia problemo. La itala anarki-faŝisto Gabriele D'Annunzio ekposedis la urbon kaj per "Roma kontrakto" el 1924 Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Serboj akceptis aliĝon de Rijeka al Italio. Post 1944 Rijeka fariĝis parto de Kroatio, respektive Jugoslavio.

Sennombraj perloj el la kroata historia koliero okazis apud Adriatika maro kaj tio prezentas grandegan argumenton pri nehazarda komenco de Esperanto-movado ĉe Adriatika maro – en Rijeka.

Kelkaj historiistoj asertas, ke la kroataj originoj kuŝas en ora tempo antaŭ Kristo, en la regiono inter la hodiaŭaj ŝtatoj Afganio kaj Irano. Tamen post restado en t.n. "blanka Kroatio", la vera hejmlando de kroatoj estas la regiono apud kaj malantaŭ la adriatika marbordo. Dum jarcentoj, ekde la plej norda duoninsulo Istrio, ĝis la plej suda parto de kroata marbordo kaj urbo Dubrovnik, okazadis gravegaj ŝtataj kaj naciaj eventoj. Verdire, oni povas skribi, ke la kerno de la kroata hejmlando estas:

MARE NOSTRUM – NIA MARO.

Ni nur mallonge menciuj iujn historiajn eventojn.

La **Diserva protokolo** de kanonikejo en Rijeka, skribita inter la jaroj 1545 kaj 1555, estis skribita per glagolica skribo kaj per la tiama kroata ĉakava dialekto. La protokolo enhavas la liston de celebritaj mesoj kaj enterigoj, kio ja estas komprenebla. Sed ĝi entenas ankaŭ raportojn pri ekleziaj elektkunsidoj kaj nekutime ankaŭ indikojn pri vendo de vino, aveno kaj vakso. Ĝi konkludas: "La loĝantaro de tiama Rijeka, kaj pastroj kaj liturgia lingvo estis kroat-slava kun glagolica skribo... Certe en vastaj tavoloj de la loĝantaro oni parolis kroatan dialekton".

Tabulo de Baŝka (insulo Krk), troviĝanta en la preĝejo de sankta Lucia, estas unu el la plej gravaj monumentoj de la glagolica skribo. Ĝi atestas, ke en la 10-a kaj 11-a jarcentoj sur la teritorio de Kroatio ekzistis hejma nacia literaturo kun nacia skribmaniero,

pli frue ol ĉe multaj aliaj eŭropaj popoloj. Ĝi montras suverenecon de la kroata reĝo Zvonimir, donacinto de terposedaĵo. Krom aliajn valorojn, la tabulo unuafoje mencias la reĝan nomon en la popola kroata lingvo.

La **Vinodola leĝaro** el la jaro 1288 (ricevinta la nomon laŭ la apudmara regiono Vinodol, nuntempe la urbo Novi Vinodolski), estas la plej malnova tiaspeca jura teksto en la kroata lingvo. Ĝi estas ankaŭ la plej malnova jura monumento de suda Eŭropo. Por la kroata jura historio ĝi estas mejloŝtono, transskribita per kursivaj glagolicaj literoj en la 16-a jarcento. Aparta valoro de la leĝaro estis, ke la rezultatoj de torturoj estis neakceptataj kaj neaprobataj en punproceso, kio estis nekonata en la tiamaj punleĝaroj de Eŭropo. Laŭ ĝi, en tribunala proceso, atestantoj estis la ĉefa pruvrimedo. La leĝaro apartas ankaŭ pro la morala protekto de virinoj, kaj la artikolo 56, unuafoje preskribas punon pro seksperforto kaj antaŭvidas, ke la juĝantaro povis konsisti nur el - virinoj!

Inter pluraj dukoj kaj reĝoj kroataj ni menciuj la dukon **Branimir** (879-892). Kiam Branimir transprenis la regadon, li tuj disigis de Bizanco. Lia situacio kaj renomo respeguliĝas en la letero de papo Johano la Oka de la 7-a de junio 879, en kiu la papo nomis lin "fama duko" kaj "altranga viro", la unuan fojon atestinte memstarecon de Kroatio.

Faust Vrančić, sibenikano (*Sibenik estas urbo en la adriatika marbordo*), en 1595 publikigis kvinlingvan (latina-itala-gremana-kroata-hungara) "Vortaron de la plej eminentaj eŭropaj lingvoj". En la vortaro troviĝas lia hejmlingvo dalmata, t.e. kroata. Estinte viziulo, li ne povis eĉ sonĝi, ke post tri jardekoj la papo malkovros "noblecon" de la kroata lingvo, kaj listigos ĝin per sia edikto inter ses mondlingvojn. En la dua verko de Vrančić, nomita "Machinae novae" (Novaj maŝinoj) estis priskribitaj diversaj teknikaj novaĵoj, ekz. pendanta ponto, "Homo volans" (paraŝutisto), entute 56 diversaj aparataroj.

Marko Marulić el Split estis la unua granda kroata mondfama verkisto, kies plej konata verko "Institucio" estis la unuan fojon presita en Venecio en la jaro 1506. Lia "Libar" (Libro), verko pri "historio de la sankta vidvino Judita en versoj kroataj kunmetita" estis la unua kroata literatura verko.

Kiam en Venecio estis publikigita la 26-an de marto 1756 "Parolo agrabla de la popolo slava" verkita de la franciskano **Andrija Kačić Miošić** (maskita apud Makarska en 1704), neniuj povis suspekti, ke ĝuste tiu verko - "libro" - estos la plej disvatigita kaj legita kroata libro, presita en 64 eldonoj, kiu ĝis la hodiaŭa tempo ne perdis sian allogon. En la verko, parte proza kaj parte dekversa, li skribis kaj kantis pri la historio de la popolo (sud)slava, ekde la plej frua tempo ĝis liaj tagoj. Li aparte menciis la bravulojn el la kroataj familioj en bataloj kontraŭ turkoj.

Dubrovnik naskis mondfamajn homojn, ekz. verkiston **Ivan Gundulić** kaj filozofon kaj scienciston **Josip Ruđer Bošković**. El la verkoj de Gundulić menciindas versa dramo titolita "Dubravka". Ĝi radias politikan alegorion, kies versoj "Ho bela, ho kara, ho dolĉa libero" estis devizo de multaj kroataj naciaj ideologioj.

Jeziuto, filozofo, matematikisto kaj sciencisto Ruđer Bošković en la latina lingvo publikigis plurajn



librojn, sed "Theoria philosophiae naturalis", (Teorio de natura filozofio) el 1758 vicigis lin en la plej famajn sciencistojn. Lian verkon la elstara nobelpremiito Werner von Heisenberg taksis jene: "Li faris fundamenojn de moderna scio pri strukturo de materio kaj lia verko en moderna scio pri filozofio kaj natursciencoj estas neevitebla."

En ĉi tiu teksto multegaj famuloj kaj eventoj

pro spacomanko ne estas notitaj. Ni menciuj kelkajn: Marin Držić, Petar Hektorović, la reĝoj Tomislav, Dmitar Zvonimir kaj Petar Krašimir la Kvara, Šiparo de Boka, Statuto de Poljice ktp.

Nia Esperanta jubileo en Rijeka signifas por ni, esperantistoj, la samon, kion iam la latina lingvo signifis por niaj verkistoj kaj scinecistoj.

INSTRUISTA KURSARO EN POZNANO

La Interlingvistikaj Studoj de Universitato Adam Mickiewicz en Poznano kaj ILEI kunorganizas internacian instruistan kursaron, kiu trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

Ĝi okazos en du surlokaj semajnaj sesioj (de la 15-a ĝis la 21-a de septembro 2007 kaj de la 2-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2008), inkluzive hejman laboradon, retan konsultiĝon kaj pretigon de laboraĵo, kies prezento kaj fina ekzameno okazos en septembro 2008. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon. Tiuj kiuj partoprenos la kursaron enkadre de siaj tri-jaraj interlingvistikaj studoj, kiel specialiĝon, ricevos diplomon pri postdiplomaj interlingvistikaj studoj.

Partoprenkotizo: A-landoj: 360 eŭroj, B-landoj 125 eŭroj por unu semestro. **Aliĝoj kaj informoj ĉe:** ikoutny@amu.edu.pl



Marvin H. Stanley (1953-2007)

forpasis la 12-an de aŭgusto en Portadown, Norda Irlando. Li naskiĝis la 20-an de oktobro 1953. Li estis diplomita ekonomikisto kaj kontisto (1975), bibliotekisto kaj informadikisto (1984). Li laboris kiel ŝtatificisto en Belfasto, kaj ekde septembro 1986 kiel ĉefkontisto de UEA. Li gvidis ankaŭ la agadon de Espermenso. Unu el liaj ŝatokupoj estis ĝardenado kaj li prizorgis la ĝardeneton de la UEA-domo.

NACILINGVA INFORMADO

"*Slobodna Dalmacija*" en Split, aperigis la 29-an de julio ampleksan artikolon de sia ĵurnalistino (neesperantistino) Tea Sumić, titolitan "**Esperanto joŝ živi u nadi**" (Esperanto ankoraŭ vivas esperante), kiu enhavas konstaton: "Enkonduko de sennacia, artefarita mondlingvo nek sukcesis nek fiaskis".

La zagreba semajna gazeto "**Fokus**" en sia numero de la 17-a de aŭgusto publikigis longan (dupaĝan) artikolon de nia redaktoro Radenko Milošević titolitan "**Hrvati su preteĉe esperanta**" (Kroatoj estas antaŭuloj de Esperanto). La artikolo legeblas en la retpaĝo de la gazeto: www.fokus-tjednik.hr kaj en la ĵus formita retpaĝo de nia gazeto legebla ĉe <http://zagreba-esperantisto.blog.hr>

29-a RENKONTIĜO DE ESPERANTO-FAMILIOJ

Julianna Vas-Szegedi



La 29-a REF, renkontiĝo por ĉiuj familioj, kiuj hejme uzas Esperanton, okazis ĉi-jare inter la 22-a de julio kaj 4-a de aŭgusto en la feriejo Tiszafüredi Ifjúsági Tábor, situanta en la Bük-montara vilaĝo Nagyvisnyó, 160 kilometrojn oriente de Budapeŝto.

Ni loĝis en lignaj domoj en pitoreska valo. Entute partoprenis 20 familioj kun 68 partoprenintoj, kies infanoj plejparte bone parolas Esperanton.

La partoprenintoj mem kreis la programon, kiu konsistis el komuna kantado, manlaboro, desegnado, sportludoj, muzikado, lingvaj ludoj, fabelo-legado kaj -verkado, naĝado, migrado, vesperaj tendarfajroj ktp.

Ni grimpis sur monteton Dédes, kie troveblas fortikaĵruino, multfoje vizitis termalbanejojn, ekskursis al Kazincbarcika kaj Eger. Ni vizitis ankaŭ la proksiman urbeton Szilvásvárad. Krom feriado, la ĉefa celo de la aranĝo estis aktivigi Esperantan lingvokapablon de la infanoj. Dum la du semajnoj la plenkreskuloj kantis, ludis kaj sportis kun la etuloj, kiuj ludante lernis, kaj progresigis sian lingvokapablon.

Valora posedaĵo de esperantistoj

Esperanto-domo en Kostrena



Esperanto-domo en Kostrena, estas posedaĵo de Esperanto-societo Rijeka, kiu ĵus preparas sin por festado de 100-jara jubileo de la fondiĝo de la unua Esperanto-societo en tiu urbo (vidu sekvan paĝon).

La urbeto Kostrena troviĝas je kvinkilometra distanco de la urbocentro de Rijeka sudorienten, laŭ la malnova apudmara vojo al Split. Ĝi estas atingebla per urba buso ĝis la bushaltejo n-ro 10. La busoj frekventas en intervaloj de 20 minutoj. La Esperanto-Domo troviĝas je 7 kilometroj de la busa stacidomo kaj je 10 kilometroj de la fervoja stacidomo de Rijeka, kaj je 25 kilometroj de la flughaveno Omišalj (sur la insulo Krk). Ĝi havas la adreson **Šodići n-ro 3** kaj telefonon **00 385 (0)51 289 478**.

Partnero de Esperanto-societo Rijeka en uzado de Esperanto-domo estas Skolta ascio de Rijeka. En la Esperanto-domo eblas organizi loĝadon, manĝadon kaj diversajn programojn.

La domo disponas pri tri dormejoj kun 10, 3 kaj 2 litoj en la teretaĝo, manĝejo, kuirejo, duŝejo, necesejo. En la unua etaĝo troviĝas kvin dormejoj kun 2, 6, 8 kaj 10 litoj, eta kuirejo, teraso, tri duŝejoj kaj du necesejoj.

Detalajn informojn vi povas ricevi ĉe: **esperanto-ri@ri.t-com.hr**,
aŭ per faksilo **00 385 (0)51 228 148**



Manĝejo



Dormejo



Esperanto-societo Rijeka invitas vin al

SOLENA FESTO DE 100-a JUBILEO DE FONDIĜO DE LA UNUA ESPERANTO- ORGANIZO EN RIJEKA KAJ KROATIO

kaj

JARA RENKONTIĜO DE KROATIAJ ESPERANTISTOJ

La solena festo okazos en **Kroata Kulturdomo** en Rijeka (Sušak) la **17-an de novembro 2007**

Programo:

- 18h00 Solena programo en Kroata Kulturdomo
- Malkovro de murtabulo kaj nomumo de Esperanto-strato
- Ekspozicio de Esperanta literaturo en Popola legejo Rijeka
- Ekspozicio de filatelistaj poŝtmarkoj
- Eldono de poŝtkoverta kun unuataga stampo (28. 09. 2007)
- Trarigardo de la urbo

Rijeka

festos centjarigon

*Titolpaĝo de
la turisma
prospekto pri
Rijeka kiu ĵus
aperis*

ALIGKOTIZO: 7,00 eŭroj (=50,00 kunaoj)

LOĜADO (unulita ĉambro/dulita ĉambro):

Hotelo "Jadran" (kvarstela) - 77,00 eŭroj/91,00 eŭroj

Hotelo "Neboder" (tristela) - 55,00 eŭroj/ 62,00 eŭroj

Hotelo "Kontinental" (dustela): 53,00 eŭroj/62,00 eŭroj

La prezoj inkluzivas duonpensionon po persono kaj po nokto, asekuron kaj turisman imposton. Eblas mendi ankaŭ plenan pensionon pagante aldone 8,00 ĝis 10,00 eŭrojn.



TRANOKTO en Domo de "Ruĝa Kruco" kostas inter 8,00 kaj 10,00 eŭrojn po nokto kaj po persono.

Detalajn informojn vi povas ricevi ĉe:

esperanto-ri@ri.t-com.hr

telefono **051 334 670**

faksilo **051 228 148**



 La foton disponigis Boris Di Costanzo




AIS SAN MARINO ANTAŬ GENERACIA ŜANĜO

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, la "universitato de Esperantujo", estas antaŭ generacia ŝanĝo: en la nova estraro, oficonta ekde 2008, pluraj el la ĝisnunaj estraranoj ne estos. Plej trafe tion esprimis vicprezidanto OProf. Carlo Minnaja en sia jarŝanĝa cirkulero, legebla rete ĉe: <http://www.ais-sanmarino.org/pr/cirkuler/06fin.pdf>. Por pluvivi kaj pluaktivi AIS bezonas la kunlaboron de novaj fortoj. Necesas ne nur senatanoj, dekanoj, fakarestroj, sed ankaŭ fidindaj organizemuloj kaj helpantoj. Proponojn akceptas kaj pli detalajn informojn donas la senata sekretario, Reinhard Fössmeier: info@ais-sanmarino.org.

24-a PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA

PSI estas tradicia internacia renkontiĝo por la tuta familio. Kun planitaj pli ol 150 gastoj el pli ol 15 landoj, en 2008 ĝi okazos en Waldfishbach-Burgalben de la 21-a ĝis la 28-a de marto. La anoncita programo estas tre varia kaj interesa por ĉiuj aĝkategorioj: diskutoj, prelegoj, kursoj, lingvaj kursoj, artaj manlaboroj,



ekskursoj, Paskonokta diservo, kineja horo, vespera kultura programo ktp. Pli detalajn informojn vidu ĉe: <http://www.esperanto.de/psi>.

BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ

La tradicia somera aranĝo BET okazis la 43-an fojon (ekde 1959), ĉi-foje en Šiauliai (Litovio) de la 14-a ĝis la -22-a de julio. Ĝi estis dediĉita al 80-jariĝo de organizita Esperanto-movado en tiu urbo. Organizis ĝin Litova Esperanto-Asocio kune kun la urba Esperanto-klubo "Ruto" kaj partoprenis ĝin 322 esperantistoj el 18 landoj, per kio ĝi fariĝis la plej amasa en tiu-ĉi jardeko. La aranĝo okazis en Fakultato de sociaj sciencoj de universitato de Šiauliai sub alta protektanteco de la urbestro Genadijus Miksys, kiu mem partoprenis la solenan inaŭguron kaj festparolis en Esperanto. Salutmesaĝojn sendis multaj institucioj kaj unuopuloj kaj paroladis, interalie, prof. Václav Tričys (vicrektoro de la Universitato), d-ro Teodoras Tamosiunas (rektoro de la fakultato de sociaj sciencoj) k.a. En la somera universitato de BET-43, gvidita de d-ro Aloyzas Gudavičius, estis legitaj 20 altnivelaj prelegoj de diverslandaj fakuloj. Okazis praktika trejnado pri Vikipedio, funkciis dunivelaj Esperanto-kursoj, aperis novaj libroj. Prezentiĝis interalia la nova eldono de "La Mastro de l' Ringoj". El aliaj programoj menciindas: kvizoj, prezento de filmoj, katolika diservo en Esperanto, belartaj konkursoj "Muzo-2007", riĉaj kultura kaj arta programoj, turismaj ekskursoj, riĉa libroservo. Ĉiutage en 300 ekzempleroj aperis kvarpaĝa gazeto de BET-43 "Sagisto", redaktita de Taesok Choe kaj legebla ankaŭ en www.esperanto.lt. La urba turisma kaj informa



centro siakoste eldonis en Esperanto 64-paĝan plenkoloran turisman gvidilon pri Šiauliai. Pli detalajn informojn pri BET-43 eblas trovi en la retejo www.esperanto.lt.

REZULTOJ DE "MUZO-2007"

Poezio originala: 1. Ne aljuĝita, 2. Christian Rivière (Francio), 3. Dimitrije Janičić (Serbio) kaj Christian Rivière (Francio); *Prozo originala:* 1. Zorka Vinceljak (Kroatio), 2. Tim Westower (Usono), 3. Lenke Szász (Rumanio). *Fotoj:* 1. Edit Oroszné Szász (Hungario), 2. Lenke Szász (Rumanio) kaj Edit Oroszné Szász (Hungario), 3. Alfreds Gegermanis (Latvio). *Deklamado:* 1. Inita Tamošiūnienė (Litovio), 2. Nora Caragea (Germanio), 3. Alfreds Gegermanis (Latvio).

NOVA RETEJO PRI GAZETOJ

La Esperanta Gazetejo (www.gazetejo.org) kunigas informojn pri Esperantaj gazetoj. Ĝi ebligas al uzantoj ĝui diversajn gazetojn kaj estas ankaŭ bona reklamilo por gazet-redaktistoj kaj eldonistoj. Nun estas aktive serĉataj gazet-redaktistoj kiuj volas prezenti rezulton de sia laboro al la esperantistaro. Vizitu la gazetejon, kaj helpu riĉigi kaj diskonigi ĝin. Kvankam la kvanto de la ofertitaj eblecoj por elŭti gazetojn estas ankoraŭ nekontentiga, la retejo supozeble rapide kreskos.

NOVTIPAJ ESPERANTO-EKZAMENOJ PREPARATAJ

Konforme al la novaj lingvotestaj normoj de la Konsilio de Eŭropo la ekzamena laborgrupo de UEA

kaj ILEI estas ellaboranta novan ekzamensistemon, kiu ebligas al la esperantistaro trapasi internaciajn ekzamenojn je tri niveloj: A, B kaj C. La novtipajn atestojn pri lingvokono pli kaj pli ofte jam postulas dungantoj kaj edukinstitutoj ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en multaj aliaj landoj de la mondo. La ekuzo de unueca normaro ankaŭ en Esperanto-ekzamenoj ebligas taksu lingvajn lertojn laŭ samaj kriterioj en kaj ekster Esperantujo, kompare kun ajna nacia lingvo. (Pli da informoj troviĝas en la sekcio *Referenckadro* en www.edukado.net). La testado de la novtipaj ekzamenoj finiĝos en tiu ĉi jaro kaj la nova ekzamensistemo povos ekfunkcii en 2008. En la unua periodo tiaj ekzamenoj estos organizataj de du eŭropaj centroj, kiuj poste trejnos kaj rajtigos ekzamenantojn kaj organizos ekzamenesiojn ankaŭ aliloke. La malnovaj ekzamenoj de UEA-ILEI dume plu estos okazigataj laŭ la malnova strukturo, t.e. en du niveloj. Estas konsilinde trapasi ilin, kiam oni bezonas atestilon por propra celo aŭ nur ene de la movado. Pri la *Referenckadro*, taksaj normoj kaj la novtipaj ekzamenoj okazis prezentoj dum la Tago de Lernejo en la UK en Jokohamo. UEA kaj ILEI alvokas siajn landajn asociojn kaj sekciojn akiri kaj studi la broŝuron "La Komuna Eŭropa Referenckadro", eldonita de UEA ĉi-jare, kaj laŭ ĝi komenci adapti siajn enlandajn instru- kaj ekzamensistemojn. Oni povas mendi la broŝuron ĉe la Libroservo de UEA aŭ elŝuti de edukado.net. Por pliaj informoj

kaj klarigoj oni kontaktu la vicprezidanton de ILEI, Zsofia Korody, esperanto-zentrum@web.de.

LEGENDA KLASIKAĴO ESTAS DENOVE HAVEBLA

Unu el la plej famaj Esperanto-libroj, "Vivo de Zamenhof", estas denove havebla. Sojle de la Jokohama UK aperis ĉe UEA la sesa eldono de tiu ĉi verko, unue eldonita en 1920, nur tri jarojn post la forpaso de Lazaro Zamenhof (1859-1917). Verkis ĝin la juna sviso Edmond Privat (1889-1962). Li estis la unua, kiu, krom priskribi la vivon de Zamenhof, ankaŭ malkaŝis liajn verajn motivojn por la kreo de Esperanto. La libro de Privat jam delonge estas konsiderata klasikaĵo. Aperis de ĝi tradukoj en ok naciajn lingvojn. La nunan eldonon redaktis Ulrich Lins. La redaktoro zorge kontrolis ĉiujn citaĵojn el paroladoj kaj verkoj de Zamenhof surbaze de "Plena verkaro de L.L. Zamenhof" de Ludovikito. En la ampleksaj notoj troviĝas font-indikoj kaj aldonaj klarigoj. La nova eldono estas pli abunde ilustrita, ankaŭ per multaj malpli konataj fotoj. Sekve la libro ne estas nur reeldono sed posedas nun tute novan kvaliton. Sendube, multaj novaj legantoj kaptos la ŝancon konatiĝi kun la verko de Edmond Privat, kiu en rava stilo proksimigas al ni la vivon, kreadon kaj ideojn de Zamenhof. Samtempe ĝi estas ĵurnalisme viveca enkonduko en la pioniran periodon de Esperanto. La prezo de la 171-paĝa libro estas 9,00 eŭroj (plus imposto de 6% en EU

kaj sendokostoj). Ekde samtempa mendo de 3 ekzempleroj la Libroservo de UEA donas rabaton de 1/3.

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN 2008 EN BELGIO

IJK 2008 kredeble okazos en Mechelen, Belgio. La estraro de TEJO daŭre ne volas malkaŝi, kiuj landoj aŭ urboj estas konsiderataj. La urbo Mechelen, kie kredeble okazos la venontjara Internacia Junulara Kongreso, situas en la provinco de Antverpeno en la nordo de la lando. La urbo havas 79.000 loĝantojn kaj situas ne tre malproksime de la landlimo de Nederlando.

VELURA SEZONO 13

La festivalo "Velura Sezono" okazos en la krimea ripozurbo Jalta (Ukrainio) de la 27-a de septembro ĝis la 6-a de oktobro 2007. La partoprenantoj loĝos en turistejo "Pavlinka". Post la festivalo okazos turista marŝo, laŭlonge de la pitoreska marbordo de la orienta Suda Bordo de Krimeo. La Festivalo estas parto de la agado "Vizaĝe al la ekstera mondo": ĝin partoprenas ankaŭ neesperantistoj-artistoj kaj okazas diverslingvaj koncertoj ankaŭ por la urbanoj, ripozantoj kaj eksterlandanoj, kiuj tiutempe abundas en Jalta. En la ĉi-jara programo okazos diverslingvaj koncertoj, konversacia E-rondo, ekskursoj, turistaj marŝoj, nokta barda kafejo, Esperanta diskoteko en urba dancejo, aparta koncerto nur en Esperanto, teatraĵoj en Esperanto kaj la rusa. La festivalon organizas jalta junulara Esperanto-klubo "Tero" kune kun subtenantoj. Informoj ĉe la loka organiza komitato: espero@yalta.crimea.ua aŭ tero@yalta.us aŭ jefim_z@mail.ru.





Gratulon al nia Kongreso la naŭdek-dua
Pro lingvo pacama en lando ĉeriza, grua!
Ni ame, sindone laboru por ĝia prospero
Por hela estonto de l' Homo, por bela la Ter'!

(DAO An Kha, Vjetnamio)



LA KONGRESO

La ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, okazis inter la 4-a kaj 11-a de aŭgusto en la japana urbo Jokohamo. Kolektiĝis en tiu urbo precize 1900 esperantistoj el diversaj landoj, sed la ĉefan parton de la kongresanoj konsistigis esperantistoj de la lando-gastiganto. La kongresejo de la ĉi-jara UK estis tre granda, kaj esperantistoj uzis nur du el ĝiaj etaĝoj, dum en aliaj partoj okazis aliaj aranĝoj.

SOLENA MALFERMO

Solena malfermo okazis dimanĉon, la 5-an de aŭgusto. La inaŭguran paroladon prezentis Renato Corsetti, prezidanto de UEA, kies mandato finiĝis en la jokohama kongreso. Li, interalie, diris: "Mi baldaŭ reakiros la plej altan rangon en Esperantujo: "simpla esperantisto", kaj en tiu rango vi retrovos min inter vi, la aliaj simplaj esperantistoj, kaj mi havos amason da okazoj por ankoraŭ danki vin pro la pasinta kunlaboro kaj plue kunlabori kun vi. Mi sopiras je la momento, kiam mi ĉesos esti prezidanto kaj fari paroladojn, kaj povos okupiĝi finfine pri io utila al Esperanto". En la solena inaŭguro partoprenis ankaŭ s-ino Natalija Brmbota, ministro-konsilanto en ambasado de Kroatio en Japanio.

NOVAJ HONORAJ MEMBROJ

Laŭ la sabata decido de la Komitato de UEA, en la inaŭgura ceremonio estis prezentitaj du novaj honoraj membroj de UEA: Konisi Gaku el Japanio kaj Endre Dudich el Hungario.

NOVAĴOJ

Laŭ la decido de la subkomitato pri financoj, la baza membro-kotizo de UEA altiĝos je unu eŭro, de 57 al 58 eŭroj jare. Japanio fariĝis lando kun la plej multaj individuaj membroj de UEA: pli ol 800. Kutime la plej multajn membrojn havis Francio, sed pro la UK en Jokohamo, aliĝis al UEA multaj novaj japanaj membroj. Meksika Esperanto-Federacio, kies membronombro falis sub 25, tamen sukcesis konservi sian statuson de landa asocio de UEA, ĉar ĝia membronombro kreskis lastmomente.

VOĈDONADO

La unua kunsido de la Komitato de UEA, dum kiu estis diskutita elekto de la nova Estraro, okazis sabaton la 4-an de aŭgusto. En tiu kunsido Povilas Jegorovas el Litovio proponis, ke anstataŭ la ok estraranoj proponitaj de la Elekta Komisiono, estu elektitaj nur sep. Lia propono estis akceptita per forta majoritato:

40 voĉoj por, 5 kontraŭ kaj 5 sindetenoj. Tute ne estis akceptita por voĉdonado la rekomendo de la Elekta Komisiono pri kandidatoj por komitatanoj C. Jukka Pietiläinen el Finnlando, komentis la komitatkunsidon kiel plenan fiaskon al la elekta regularo kaj la Elekta Komisiono, aparte por Edvige Tantin Ackermann, kiu ne nur ne elektiĝis al la nova Komitato, sed kiu eĉ ricevis plej malmulte da voĉoj el ĉiuj kandidatoj (14). Komece de la lunda kunsido de la Komitato de UEA estis fine diskonigita la rezulto de la fermita baloto pri la nova Estraro. La Komitato elektis Estraron laŭ la rekomendoj de la Elekta Komisiono, tamen sen Marija Belošević, kies kandidatiĝo levis grandajn protestojn en Kroatio (pri la kaŭzoj skribis ankaŭ nia revuo en sia 2-a numero). La nova Estraro konsistas el sep membroj, el kiuj tri estas virinoj, kaj tri ekstereŭropanoj. El la malnova Estraro restis nur Claude Nourmont el Francio kiel vicprezidanto. Aliaj membroj estas Ranieri Clerici (Italio, vicprezidanto), Probal Dasgupta (Barato, prezidanto), Loes Demmendaal (Nederlando), Hori Jasuo (Japanio), Barbara Pietrzak (Pollando, ĝenerala sekretario) kaj José Antonio Vergara (Ĉilio).





Ĉiutaga kongresa kuriero portis la titolon "Ondas Jokohamo" kaj redaktis ĝin HORI Jasuo.

Por Marija Belošević voĉdonis nur 9 komitatanoj, kontraŭ 36 kaj sin detenis 7. La plej bonan rezulton havis Probal Dasgupta: 49 por, 2 kontraŭ kaj 1 sindeteno.

CENTRA OFICEJO RESPONDAS

Marde matene tradicie respondadis la Centra Oficejo. Osmo Buller pri eventuala UK en Moskvo diris, ke ĝi certe okazos en proksima estonteco, sed li esprimis dubon ĉu tio eblas jam en 2010. Grandan intereson altiris demandoj pri diversaj fondaĵoj, interalie pri Azia kapitaŭ kaj Azia Fondaĵo, ebleco havi fiksdatan mondeponon ĉe UEA kaj ebleco "aĉeti" libroŝrankon en nova Biblioteko Hector Hodler. Pri novaj kandidatoj por UK, Osmo Buller diris, ke por 2010 ankoraŭ ne venis invito el ekstereŭropo, sed ke en la aero ŝvebas invitoj el Kubo kaj Argentino. Unu el la ripetigantaj temoj estis ankaŭ demando pri ebleco de reta aliŭo al uea-kontoj, kion multaj membroj opinias oportuna,

sed Osmo Buller respondis, ke li ne fidus tian solvon kaj ke li ne povas garantii, ke neniuj eksterulo povus aliri la komputilan sistemon de UEA, kaj tial tiu ebleco ne estos permesita almenaŭ dum lia periodo kiel ĝenerala direktoro.

KROATINOJ EN LA KONGRESA PROGRAMO

Dimanĉon, la 5-an de aŭgusto Spomenka Štimec partoprenis en la programo de japanaj poezi-amantoj, kune kun unu el la plej grandaj nuntempaj japanaj poetoj, Tanikawa Shuntaro kaj István Ertl. Ŝi ankaŭ prezentiĝis en aŭtoro duonhora la 9-an de aŭgusto.

Concerton de marimbo prezentis mardon, la 7-an de aŭgusto, Kaja Farszky. La programo konsistis el bunta internacia repertuaro.



NITOBE-SEMINARIO

Post Prago (1996), Berlino (1999), Pekino (2004) kaj Vilno (2005), por la kvina fojo okazis Nitobe-seminario, kiu ĉi-jare havis la ĉeftemon la rolon kaj perspektivon de eŭropdevenaj lingvoj en Azio. Inter dudeko da prelegantoj troviĝis ankaŭ la aŭtoro de la verko "Ĉu nur-angla Eŭropo", Robert Phillipson. La seminario okazis en la Eŭropa Instituto de la universitato Sophia en Tokio, senpere antaŭ la inaŭguro de la UK en Jokohamo.

UNIVERSALA KONGRESO EN 2009 OKAZOS EN BJALISTOKO

Laŭ la decido de nova Estraro de UEA, la 94-a Universala

Kongreso de Esperanto okazos en Bjalistoko (Pollando), en kiu la urbaj aŭtoritatoj donas plenan apogon al Esperanto kaj al sia fama samurbano Zamenhof. Legu pli detale en la artikolo "Jes, mi volas!" en la rubriko "Tra la mondo" (paĝo 81).

KOMITATO

La 10-an de aŭgusto, en sia lasta kunsido gvidita de la nova prezidanto Probal Dasgupta, la Komitato de UEA akceptis la buĝeton por 2008. Nova landa asocio de UEA fariĝis Asocio de Esperantistoj de Taĝikio, kaj kiel nova komitatano C estis elektita Josep Franquesa Solé, prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio, kiu ne estas landa asocio de UEA, kaj tial ne havas la rajton nomumi propran komitatanon A. Estis diskutitaj raportoj de ok subkomitatoj. La Internacia Ekzamena Komisiono de UEA kaj ILEI havos novan konsiston post baldaŭ okazonta konfirma voĉdono de ILEI. Laŭ la decido de la Komitato de UEA, Probal Dasgupta, kiu ĝis nun estis prezidanto de la Ekzamena Komisiono, forlasas sian postenon por dediĉi sin al sia nova tasko, kaj la prezidanto de la Ekzamena Komisiono iĝos Mireille Grosjean.

BELARTAJ KONKURSOJ

Proklamo de la rezultoj okazis la 10-an de aŭgusto post la komitatkunsido. Vidu la rezultojn en la paĝo 78.

SOLENA FERMO

Dum la ferma ceremonio la 11-an de aŭgusto Esperantlingve parolis la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski, kiu bonvenigis la Universalan Kongreson de la jaro 2009 en sia urbo. La kongreso akceptis laŭkutime kongresan rezolucion, kies plenan tekston vi povas legi en la paĝo 78.

REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2007

POEZIO:

- 1-a premio: Anja Karkiainen (Finnlando) pro “En ambaŭ”;
 - 2-a premio: Michael Cayley (Britio) pro “Memoroj”;
 - 3-a premio: ne aljuĝita.
- Partoprenis 30 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.

PROZO:

- 1-a premio: Tim Westover (Usono) pro “Ruĝvela ŝipo”;
 - 2-a premio: Lena Karpunina (Rusio) pro “La botoj”;
 - 3-a premio: Sten Johansson (Svedio) pro “Frotvundo”.
- Partoprenis 24 verkoj de 13 aŭtoroj el 11 landoj.

ESEO:

- 1-a premio: Geoffrey Sutton (Britio) pro “Pri la periodoj de la Esperanto-literaturo”;
 - 2-a premio: Paulo S. Viana (Brazilo) pro “Psiko-memhelpa literaturo: utila? senutila? malutila?”;
 - 3-a premio: Tony del Barrio (Hispanio) pro “La normala lingvo”.
- Partoprenis 8 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj.

TEATRO

- 1-a premio: ne aljuĝita;
 - 2-a premio: Brian E. Drake (Usono) pro “Koroj en mallumo”;
 - 3-a premio: ne aljuĝita;
 - Honora mencio: Stefan MacGill (Hungario) pro “La aŭto-mato”.
- Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj e 2 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO:

Eldonejo “Éditions Pour penser à l'endroit” pro la libro “Ĉio fareblas de Aline de Pétigny”, tradukita de Martine kaj Christian Rivière. Partoprenis 5 verkoj el 5 landoj.

KANTO:

- 1-a, 2-a, 3-a premioj: ne aljuĝitaj;
 - Honora mencio: Dina Lukjanec (Kazaĥio) pro “La urbo ora”.
- Partoprenis 8 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

REZOLUCIO DE LA 92-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

akceptita de la Komitato de UEA la 10-an de aŭgusto.

La 92-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) kun 1900 partoprenantoj el 57 landoj kun la temo “Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto”,

Konstatinte, ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter “Okcidento” kaj “Oriento”, sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

Konstatinte, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

Notinte, ke tro rigidaj konceptoj pri “Okcidento” kaj “Oriento” malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

Notinte kun kontento, ke la 2008-a jaro estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

Rekomendas, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,

Konfirmas la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

Atentigas samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

Deklaras, ke la ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

Esprimas la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.



Nun mia patro el la ĉielo

✍ Zdravko Seleš

Nun mia patro en la Ĉielo,
ĉe Nia Patro en la Ĉielo,
poreterne ripozas.
Ne bruas iloj lignaĵistaj,
ne vokas homoj telefone,
nek zorgoj premas kaj problemoj:
nun fajnas tagoj poreternaj,
nur molas, flokas, plumas ĉie
la anĝelaro flugetanta.

Nun mia patro en la Ĉielo,
ĉe Nia Patro en la Ĉielo,
poreterne enuas.
Nenie pordo ekzistanta,
fenestro, tablo, seĝo ligna,
ia necesa riparado:
ĉio nur flirtas, ŝvebas, muzikas;
neniu scias pri ajna problemo,
neniu zorgas pri inta aŭ onta:
pri familio, edzino, filoj...

Nun mia patro en la Ĉielo,
ĉe Nia Patro en la Ĉielo,
versajne tamen serĉas randon;
de kie oni povas vidi
al la Ĉielo fiksitajn rigardojn,
al la Ĉielo faritajn demandojn
kaj varmajn petojn, sonorajn preĝojn:
ho Nia Patro en la Ĉielo
faru ke poreterne trankvilu
eĉ mia patro en la Ĉielo.

Nun mia patro en la Ĉielo,
ĉe Nia Patro en la Ĉielo,
al mi dubanta svingas, svingas.

Mia patro eble en la Ĉielo.

Al vi

✍ Jolanda Józsi (Rumanio)

En spegulo de viaj okuloj, mi vidas:
viajn infanaĝon, amon, estimon.
La vigleco de viaj okuloj –
via klopodo, batalo por estonteco,
Via serioza rigardo –
via juĝo, eterna sopiro,
Via kareso –
konsolo de mia animo,
Via paŝo –
ondado de via personeco,
Via voĉo –
resonado de via animo,
Via amo –
direktanto de via karaktero.

* * *

✍ Mirek Grena (Ĉeĥio)

Pluvas frostotreme
kvankam tondras je tempoj.
Super olda muelilo flugas kojne
aro da sovaĝaj anseroj
por en kaoso de la hastema mondo
trovi certecon kiun senpage
donas al ili iu tre riĉa.
Kaj hodiaŭaj Arkimedo
serĉas fiksan lokon por malkovri
1001-an sekreton de la naturo.
Sed kiu ekmovos homan koron
pli pezan ol ĉia materio de la universo?
Amiko, ĉu vi aŭskultas?
Eble la homo
kiun vi ĵus renkontis
je vojkruciĝo de homaj sortoj
portas interne neresponditan demandon
kaj vi partoprenante kun li
paŝojn eĉ penojn de pilgrimado
helpos al li trovi respondon.
Ĉesis pluvi, fintondris.
Fore malantaŭ horizonto
pli riĉa pri la renkonto
li antaŭsentas la sunon



93-a UK EN ROTERDAMO

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto, okazos de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008 en Roterdamo. Universala Esperanto-Asocio invitas la Kongreson por 2008 al Roterdamo, ĉar UEA en tiu jaro ekzistos 100 jarojn.

La kongresejo estos: La "Beurs" W.T.C. (vidu la ĉi-supran foton). Adreso: Beursplein 37, 3011 AA Rotterdam. www.wtcrotterdam.nl. LKK konsistas el ses personoj: Ans Bakker-ten Hagen (prezidanto), Ineke Emmelkamp (sekretario), Joke Hoobroeckx-Dooren (eksteraj rilatoj), Bert de Wit (informado), Loes Demmendaal (ekskursoj), Marijke Lathouwers (kongresejo).

23-a ARKONES 2007

ARKONES (=Artaj Konfrontoj en Esperanto, vidu: www.arkones.republika.pl) estas sendependa kultura kaj arta esperantista aranĝo en Pollando, kiu okazas sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio kaj Pola Esperantista Junularo. Ĝi estas certe la plej unika kaj unu el la plej grandskalaj manifestacioj de Esperanto-kulturo. La aranĝo organize ne dependas de iu ajn ŝtata, kultura aŭ esperantista institucio, organizaĵo aŭ asocio

ktp., sed volonte kunlaboras kun ĉiuj. Ĉi-jare ĝi okazos de la 21-a ĝis la 23-a de septembro. En la programo prezentiĝos: Anjo Amika (=Anna Bartek), Kim Jezus (Hotel Desperado), Zuzanna Kornicka, JoMo kaj Liberecanoj, Jarlo Martelmonto, Marteno Minich, Fundu Mikatukidi kaj Vigla Miziko el DR Kongo. Prelegos: Alfred Kobina Arthur, Augusto Casquero de la Cruz, Tomasz Chmielik, Roman Dobrzyński, István Ertl, Zbigniew Galor, Judita Rey Hudeček, Ilona Koutny, Aleksander Korĵenkov, Zofia Korody, Lidia Ligeza, Stano Marček, Jarosław Parzyszek, Barbara Pietrzak, Claude Piron, Jerzy Rzdzki, Irmina Szustak, Reza Torabi, Peter Zilvar kaj aliaj.



REAPERIS "KROATA ESPERANTISTO"

En la retpaĝo de Kroata Esperantista Unuiĝo (www.keu.hr), konkurenca asocio de KEL (Kroata Esperanto-Ligo), reaperis "Kroata Esperantisto", kiu ekde la jaro 1992 (ĝis 1997?) aperadis kiel presita organo de KEU, kaj post tio dum kelka tempo kiel interreta eldonaĵo. Post pluraj jaroj de silento, ĝi reaperis kaj alportis temoj ĉefe nemovadajn. Aŭtoroj de unuopaj artikoloj estas: Marija Belošević, Zdenka Svetličić, Ivan Bekavac Basić, Zora Heide, Željko Vurm, Martina

Kvarantan, Svijetlana Akik kaj Lucija Borčić. Nia redakcio sendis bondezirojn al la reaperinta gazeto, kiun vi povas trovi en la retejo de KEU.

LERNU-ANOJ KUNSIDIS EN LITOVIO

La retejo lernu.net estas la plej ampleksa kaj plej populara multlingva paĝaro por lernado de Esperanto. Dum junio ĉi-jare ĝi ricevis 77.000 vizitojn, kaj estis legitaj 1,3 milionoj da paĝoj. De la 11-a ĝis la 16-a de julio la kerna teamo de *Lernu* kaj de la tegmenta projekto *Esperanto@Interreto* kunvenis en Kaunas (Litovio) por prepari aliĝon al Eŭropa Junulara Fondaĵo kaj por diskuti la kreon de tute nova, granda Esperanto-portalo en la reto. La ideo pri la retejo *Lernu* naskiĝis en 2000 en Svedio, kaj starigon de la paĝaro ebligis ESF (Esperantic Studies Foundation) el Usono. La retejo ekfunkciis en decembro 2002 kaj ĝis nun ĝi ekzistas en 28 lingvoj, el kiuj la plej populara restas la angla. La kunsidon en Litovio ĉeestis Hokan Lundberg, Jevgenij Gaus, Bertilo Wennergren, Neringa Zasaite kaj Sonja Petrović-Lundberg. El la kernaj teamoj ne povis ĉeestis Oleg Izjumenko kaj Erin Piatieski. Unu el la ĉefaj temoj de la kunsido estis aliĝi al Eŭropa Junulara Fondaĵo, kio ebligis ricevon de subvencioj por pliaj seminarioj. En Litovio estis preparitaj la necesaj dokumentoj por la aliĝo.

CHOMSKY APEROS EN ESPERANTO

En 2005 aperis la anglalingva libro "Imperial Ambitions", en kiu la konata usona lingvisto Noam Chomsky estas intervjuata de la ĵurnalisto David Barsamian. Chomsky en tiu libro akre kritikis la lastatempan internacian politikon de Usono,



kaj li donis permeson publikigi la verkon ankaŭ en Esperanto. La libro estas jam tradukata de Renato Corsetti. Diskonigo de tiu informo elvokis akrajn kritikojn kaj diskutojn, pro la prezidanta pozicio de Corsetti en UEA.

JES, MI VOLAS!

Ĉirkaŭ 3500 homoj subtenis la ideon organizi la Universalan Kongreson de Esperanto en 2009 en Bjalistoko. La subskribojn sub alvoko al Universala Esperanto-Asocio kolektadis Bjalistoka Esperanto-Societo, redakcio de gazeto "Poranny" kaj multaj volontuloj. La kolektado sub Esperanta nomo "Jes, mi volas!" elvokis interesigon de la loĝantaro de Bjalistoko kaj de turistoj. La lastan tagon, la 6-an de aŭgusto, ĝin subskribis ankaŭ la urbestro, sciencistoj, politikistoj, artistoj kaj sportistoj polaj. La 7-an de aŭgusto la urbestro d-ro Tadeusz Truskolaski flugis al Jokohamo kaj tie renkontiĝis kun la nova Estraro de UEA. D-ro Truskolaski transdonis al la Estraro alvokon de bjalistokanoj por okazigo de la UK en ilia urbo. La Estraro en sia kunsido la 9-an de aŭgusto decidis, ke la 94-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bjalistoko, por omaĝi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof en lia naskiĝurbo mem. La urbestro de Bjalistoko, ĉeestis la kunsidon, kune kun la prezidantino de Bjalistoka Esperanto-Societo, s-ino Elzbieta Karczewska, kaj s-ro Aleksander Zdechlik, kiu reprezentis la Ĉefan Estraron de Pola Esperanto-Asocio. Krom entuziasman akcepton de la urbanoj, la bjalistoka urbestro promesis vastan apogon de la urbo al la organizado de la kongreso.

EKUMENA KONGRESO

En la pola urbeto Pelplin,

 *Snjezana Habulin*

TEATRA HISTORIO DE ZAGREBO

Teatra historio de Zagrebo devenas el la 11-a jarcento, ekde kiam en ĝi, samkiel ankaŭ en plimulto de la eŭropaj urboj, prezentiĝis siaspeca formo de mezepoka teatro en preĝejoj kaj urbaj placoj. En la 16-a jarcento la teatraĵoj estis prezentitaj en la ekleziaj lernejoj en Kaptol kaj en la stratoj de la proksima Gradec. Ĝis la fino de la 18-a jarcento sursceniĝis teatraĵoj en formo de lernejaj teatraĵoj en la kroata lingvo, kajkvadialektaj komedioj prezentiĝis en la kaptola seminario kaj en la nobela konvikto en Gradec, kaj ĉiam pli ofte gastis ankaŭ fremdaj teatroj, plejofte germanaj kaj italaj, prezentante dramojn, muzikon kaj dancojn. La gastantaj teatraĵoj prezentiĝis en la unua zagreba publika halo por popolaj prezentaĵoj, la iama monahinejo de klaraninoj, hodiaŭa Muzeo de urbo Zagrebo, kaj ankaŭ en unuopaj nobelaj palacoj de Supra urbo. Ekzemple, la palaco Pejaĉević, hodiaŭa Kroata naturscienca muzeo, de 1797 ĝis 1834, kune kun ĉiuj trajtoj de publika teatro, funkciis kiel Teatro de Amadeo, nomita laŭ la familia nomo de sia lasta

de la 21-a ĝis la 28-a de julio okazis la 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso. Laŭ la novaj agentejo IKA (Informa katolika agentejo) el Zagrebo, la kongreson partoprenis pli ol 200 esperantistoj el dudeko da landoj. La kongreson partoprenis ankaŭ Marija Beloŝević el Kroatio, kiu

posedanto, granda distriktestro de Zagrebo. Zagrebo en 1836 ricevis la unuan profesian teatran institucion kaj konstruaĵon, kiun per la mono ricevita en la viena loterio, konstruis grandnegocisto Kristofor Stanković sur la Placo de sankta Marko, sur la tereno donacita de la urba magistrato. Apud la gastantaj eksterlandaj teatraĵoj grupoj, sur tiu scenejo en 1840 estis prezentita la unua teatraĵo en la kroata lingvo, heroo ludo de Kukuljević, nomata "Juran kaj Sofio aŭ Turkoj apud Sisak", prezentita de la Hejmlanda teatra societo, kaj en la jaro 1846 ankaŭ la unua kroata opero "Amo kaj malico" de Vatroslav Lisinski. Sur la scenejo de tiu ĉi supra urba teatro komencis sian aktivadon ankaŭ la hodiaŭa Kroata nacia teatro en Zagrebo en 1860, komence nur kiel drama teatro, kiun Kroata Parlamento en la teatra leĝo, akceptita jam sekvontjare - kiel unu el la unuaj en Eŭropo - proklamis ŝtata institucio.

faris prelegon. Dum la kongreso kunsidis ankaŭ IKUE en sia 60-a kongreso, dum kiu ĝi elektis novan estraron. Kiel prezidanto estis reelektita Miloslav Šváček el Ĉeĥio, kaj kiel vicprezidantoj (re)elektiĝis Marija Beloŝević (Kroatio) kaj Attila Szép (Hungario).



MILITTEMPA BALADO

Josip Pleadin

Majo odoris per plena forto. Verdajoj ĉie disŝutitaj ornamis la belan mondon. Hungara stepo, ebena kiel maro, luliĝis en printempa trankvilo. Abeloj karesis kalikojn de buntaj floroj dismetitaj tra la stepo. Eta vilaĝo, dormema kaj senhoma, kuŝis meze de la verdaĵo, kvazaŭ morta kaj dezerta. Polva vojo etendiĝis rekte tra la kampoj kaj trairis la vilaĝon. Ĝi estis malplena, sen homoj kaj veturiloj, sen bovinoj kaj anasoj. En la ombro de maljuna morusujo, ĉe la orienta rando de la vilaĝo, aro da knaboj kuŝis senzorge, dormeme ... Subite la idilian bildon renversis bruaj sonoj ...

La knaboj saltleviĝis kvazaŭ je komando kaj gapis en la ĉielon, kriante:

- Ili venas, ili venas denove!!!

La lazura ĉielo, ĝis kie la vidpovo atingis, ŝutiĝis per strangaj, bruantaj birdoj. Aviadiloj! Usonaj! Amaso da bruaj gigantoj, kiel granda birdaro flugis ĉiam al la sama direkto. La sovetaj radio-stacioj elsendis novaĵojn: grandaj germanaj urboj estis konstante atakataj elae, bomboj je tunmiloj faladis sur iam imponajn konstuaĵojn, kaj la urbegoj fariĝis amaso da rubaĵoj, polvaj nuboj kaj mizero. Grandaj infanaj okuloj gapis sen palpebrumo, la buŝoj estis malfermitaj, la spiro haltis, kaj la fingretoj provis nombri la ferbirdojn. Sensukcese!

La enaeran bruon supertondris la surtera ... Polvonuboj el la orienta flanko ŝajnis grandegaj, kvazaŭ antaŭ ŝtormo. Bruis kamionoj verdkoloraj, tirantaj grandegajn kanonojn. "Katjuŝoj" venis akompane. Miloj da soldatoj sub kaskoj, maŝinpafiloj pretaj enmane ... Helbrunaj uniformoj egalas la koloron de ilia haŭto. Dike kovritaj per fajnaj sableroj, seriozaj kaj batalpretaj, ili hastis al la fronto. Ruĝa Armeo atakos jam ĉi-vespere la lastajn germanajn trupojn. Germana propagando ankoraŭ kuraĝigis la truprestaĵojn en la tranĉeoj, kvankam la milito iris al sia fino, kun granda aroganta monstro kiu postsekvis ĝin - malvenko, honto kaj kapitulaco.

La rivero Dravo fluis en sia kutima kuŝejo, zigzagis preter riverkurbiĝoj, preterpase karesis la renversitajn pontojn ... Ĝia akvo portis deŝiritajn trunkojn, kadavrojn kaj sangon. En la kroata flanko elfositaj longegaj tranĉeoj ŝajnis senhomaj. Malĝuste! Ili plenplenis, ili estis plenŝtopitaj per homoj ŝvitaj kaj malpuraj, per grenadoj, bomboj kaj pafiloj, mitraloj kaj minjetiloj. La uniformoj ne permesis rekoni al kiu armeo apartenis la bunta kompanio. Nur ŝtalaj kaskoj kun germanaj simboloj

diris la veron. Ĉi tie atendis sian lastan batalon la lasta restaĵo de iam grandega, timiga kaj ĉiopova germana armeo. La homoj estis palaj, sur iliaj vizaĝoj legiĝis sendormaj noktoj kaj malsato. Ili ne estis la samaj belunifformaj soldatoj, bonodoraj kaj puraj, kiuj en frua printempo de 1941 paradis fiere sur stratoj de la kroata ĉefurbo. Pro la streĉoj ili elĉerpiĝis, kadukiĝis kaj malmultiĝis.

Hans, la dekestro, rigardis tra paftruo al la rivero. Lia maŝinpafilo estis ŝargita kaj direktita al la riverbordo. Sed li ne vidis Dravon, li vidis sian ŝatatan Elbon. Kie estas Dresdno, tra kiu li promenis preter la rivero? Kie lia edzino Judith kaj la infanoj kiujn li jam delonge ne karesis? Lia rigardo estis foresta, kvazaŭ li vivus en alia mondo, kie ĉio ŝajnis eĉ senhonte perfekta! Li, povra, ne scias, ke Dresdno ruinigis sub bomboj de la usonaj aviadiloj, kiuj tag-post-tage haste flugis al lia patrujo. Hans traglutis la dolorbulon en sia gorĝo, el lia okulo ruliĝis larmo kaj malsekigis la ŝtalan tubon de la maŝinpafilo. Li viŝis kaj la okulon kaj la tubon. Surfunde de la tranĉeo kuŝis liaj soldatoj, apogitaj unu al la alia. Inter iliaj gamboj, tubsupren elstaris la pafiloj, malpuraj, kotaj, sed uzeblaj. Kiom da vivoj ili forprenis dum lastaj jaroj en sangaj bataloj? Ĉu la soldatoj pensis pri tio? Dubinde! Por ili pli gravis la propraj tragedioj, ne la fremdaj!

En la hungara riverbordo, longa kamionkolono, serpentume alproksimiĝis kaj subite haltis. Altbota oficiro el la unua ĵipo, seriozmiene rigardis la kolonon el sub la oficira ĉapo. Altrangulo! Li decidis pri vivo kaj morto, pri sortoj de nekonataj rusaj kaj germanaj soldatoj ambaŭflanke de la rivero.

Iom post la halto, revenis la soldatoj el antaŭposteno. Ilia esploro nur konfirmis la antaŭajn informojn. Atendis ilin militdecida kaj sangoverŝa batalo. La altranga oficiro prenis binoklon kaj detale esploris la riverfluan kaj la alian bordon. De tempo al tempo li vokis iun suboficiron kaj ordonis al li plenumi iun taskon. La soldatoj malŝarĝis la kamionojn. Kanonoj direktis siajn kol-egojn al la rivero. Ĉiu dekopo kolektiĝis ĉirkaŭ sia estro. Ie zumis buŝharmoniko sonojn de rusa popola kanto. Siberia kanto laŭŝajne ... Iom flanke, bulgaraj soldatoj sindetenaj sidis sur mola pajlo. Ivan revis pri Stara Zagora, pri la bulgara montaro kaj pri sia pli juna solfratino paŝtanta bovinojn en iu fora herbejo.

La nokto jam tre malhelis. Nenie eĉ unu stelo brilis super la lacaj armeoj ambaŭflanke de la rivero. Okuloj iliaj egale streĉe rigardis al kontraŭa flanko. Serĉante eĉ unu solan movon por alarmi la kunsortanojn. Kvazaŭ morte kuŝis la kampoj, eĉ



la rivero sensone preterpasis, senbrue trairante la danĝeran lokon.

Antaŭ tagiĝo, la aŭroro ruĝe farbis ĝian akvon.

- Malbona aŭguro! - diris Ivan en la hungara flanko.

- Hodiaŭ la rivero estos ruĝa pro sango! - kvazaŭ leginte la pensojn de la bulgara dekestro, diris Hans en la germana tranĉeo al siaj kunbatalanoj.

La altrangulo soveta eliris grandpaŝe el sia tendo. Postsekvis lin kelkaj oficiroj kiuj diskuris senbrue al siaj taĉmentoj.

Ekgrincis la kanoninstalaĵoj. Grandegaj tuboj de "katjuŝoj" estis ŝargitaj per misiloj. La lertaj moviĝoj en la soveta tendaro anoncis baldaŭan inferon.

Post duonhoro ektondris ordonoj: "Fajro!"

Kanontuboj unu post la alia ektondris.

Soldatoj haste alportis novajn grenadojn. Per siblaj sonegoj "katjuŝoj" elĵetis sian enhavon kun flamaj vostoj. Ŝvitis la sovetaĵoj. Grenadoj kaj misiloj boris la kontraŭbordajn tranĉeojn, kun obtuzaj sonoj kaj homaj vekrioj. Dume la bulgaraj trupoj kuŝis en sekura loko for de la brulanta kaldrono. Por ili la soveta supera oficiro preparis ion pli gravan, ion pli doloran. Ivan antaŭsentis tion. Ili ĉiam devis preni la plej malfacilajn taskojn sur siajn ŝultrojn.

Dum kvaronhora infera fajro, la dekestro Hans ne povis eĉ kapon levi supren. Li nur kriis kolere: "Fek! Damnaj rusoj!" Kaj tiam ekregis morta silento. Hans suprenlevis la kaskokovritan kapon kaj rigardis transen!

Ĝis posttagmeze la rusoj studis efikon de kanonpafado, observis kaj planis. Moskvo postulis rapidan antaŭeniron. Sen halto, sen ŝparo de homvivoj kaj eksplodaĵoj.

Vespero la dekestro Ivan, samkiel aliaj bulgaraj suboficiroj ricevis ordonon. Tiunokte ili tranaĝos la riveron per flosoj kaj atakos dum mallumo la tranĉeojn de germanoj. En la homajn animojn enŝteliĝis frostotremo antaŭ decida momento. Nur vodko kuraĝigis ilin ...

Mallaŭte sonis "Lilli Marlene" en la germana tranĉeo. La soldatoj per lastaj fortoj zumis la vortojn de la melodio, kiu kuraĝigis iliajn samarmeanojn en la rusa fronto. Dolĉa dormemo kaj nutroefiko de la melodio plenigis iliajn malplenajn stomakojn. Kelkaj el ili atente perrigarde boris la malhelon kiu kovris la dekmeteran distancon ĝis la ŝaumanta rivero. Kvazaŭ ĉi-nokte ĝi muĝus pli laŭte,

kvazaŭ ĝi flustrus: "Atentu! Atentu!"

Kiel fantomoj, la bulgaraj militistoj glitis per flosoj sur la riversupro. La korpoj mortotremis, dio sciŭ ĉu pro la frideco de la akvo aŭ pro la timo. Regis plena silento, streĉa atmosfero tamburis en la oreloj kaj la gorgoj malsekis ĝis dolorsento. "Ĉu mi dronos?". "Ĉu trafos min kuglo jam en la akvo?". "Dio, gardu min!"

La okuloj de la dekestro Hans estis sangoplenaj pro maldormo. Kvazaŭ li havus sablon en ili. Kurteno de dormemo malleviĝis en la lacajn okulojn. Sed li gapis kaj aŭskultis. Kaj tiam per fingro ĉeŭse li signalis silenton al siaj kamaradoj. Centope oreloj streĉe aŭskultis.

"Alarmo!"

En la malhelan ĉielon leviĝis lumigaj raketoj. La rivero kaj la tero antaŭ la tranĉeoj heliĝis kvazaŭ tagmeze. La flosoj kaj la bulgaraj kaskoj rebrilis en la riverfluo. Mitraloj kaj minjetiloj trudis kapmallevon al la bulgaroj enakve. Dolorkrioj de la paftrafitaj soldatoj, krioj kaj malordo en la mallarĝa terzono antaŭ la tranĉeoj kirliĝis en mortodanco sub lumraketoj. Multaj vidis kamaradojn kadavre flosi en la akvo ... Malmultaj sukcesis alteriĝi ...

La dekestro Ivan hurais al siaj kunbatalantoj, ekstaris kaj kuratingis la tranĉeon. La travivintaj soldatoj bulgaraj sekvis lin kun konsterniga kaj sangoglaciiga krio. Pafado ĉiuflanke ... Bajonetoj distrancis la karnon kaj la sango ŝprucis, varmega kiel fandita plumbo. Nova ondo de batalantoj el la hungara riverflanko haste atingis

la alian bordon ... Kaj nova ... kaj nova ... Faladis batalkamaradoj sur tiu mallarĝa ĉerivera zono, kiu disigis popolojn kaj batalantojn, homojn kaj lupojn.

Hans estis trafita per bajoneto en la kolon kaj dum la lastaj momentoj, kiam la varmega sango kiel fontano ŝprucis el la distrancita kolarterio, li pensis pri belaj parkoj de Dresdeno, kaj pri siaj infanoj kiuj tretis herbojn, feliĉaj kaj senpekaj.

Ivan estis truita per mitralrafalo, kaj lian huraoon ne plu aŭdis liaj kamaradoj kiuj en diabla tumulto buĉis la malamikojn. Nenie mirakla faro de dio, nur aĉa homfaro!

Nova mateno venis bela kaj kvieta. Kanonoj mutis ĉe la hungara riverbordo, la minjetiloj ĉe la alia flanko. Sur la tranĉeoj flirtis blanka flago ... Malfrue por Hans kaj Ivan! Gustatempe por multaj travivintoj. En sangomakulitaj uniformoj, disĵetitaj homaj korpoj kuŝis ĉie, ĉie ... La ordenornamita soveta altranga



oficiro kun alten levita kapo, fieris pro la venko. La militkaptitoj estis senigitaj de la homa honoro, kun manoj surkape transportitaj al iu milittendaro.

Junuloj el la proksimaj vilaĝoj, laŭ ordono de la venkintoj, venis per ĉevalĉaroj kaj transportis la mortajn soldatojn al la vilaĝa tombejo. Ili zorgeme metis la kadavrojn germanajn unuflanken, la bulgarajn aliflanken. Kiel tritikplenajn sakojn ili metis la homkorpajn kaj iliajn restaĵojn en la ĉarojn, kaj la ĉevaloj malfacile tiris la malĝojigan ŝarĝon. Postĉare gutis sango sur polvan vilaĝan vojton.

La vilaĝa tombejo estis tro malvasta por la perditaj animoj, serĉantaj sian lastan kuŝon. Ekster la tombeja korto, ĉe la masonita barilo, la junuloj sen troa fervoro, elfosis longan kaj profundan kavegon. La loka meblisto oferis lastajn lignobretojn el sia stako. La bretoj estis metitaj sur la humidan fundon de la kavego, kaj la korpoj de malfeliĉaj bulgaraj sturmantoj, volvitaj per blankaj litotukoj, orde vicigitaj unu apud la alia, samkiel ili iam staris en vico antaŭ siaj dekestroj. Kvardeko da ili, junaj bravuloj, kies patrinoj kaj edzinoj, anstataŭ ilia reveno, ricevos peceton da metalo nomata kuraĝordeno. Sur la tomba monteto, super iliaj kapoj, estis enpikitaj lignaj krucoj kun numeroj. La listo sendita al la soveta militministerio.

Al la germanaj ministroj neniu sendis informon pri pere de Hans kaj liaj kamaradoj en kota tranĉeo ĉe la lasta posteno. La generaloj ne sciis pri ilia sorto. Iliaj korpoj kuŝas en alia tombejflanko, en amasa tombo. Por postaj generacioj ili estos “nekonataj germanaj soldatoj”.

Pasis duonjarcento ... Politikoj perturbis la mondon, ankoraŭ miloj da soldatoj diversuniformaj pereis en militoj diverslande. La solfratino de Ivan fariĝis maljunulino. Ŝi estis lia lasta parenco. En malnova vitrino en ŝia apartamento en Stara Zagora, la soveta ordeno kolektis polvon. Nur ŝia rigardo ĉiutage en ĝi serĉis la perditan fraton. Ŝi parolis al ĝi kvazaŭ al lia animo ...

Kroata delegito de Universala Esperanto-Asocio ricevis strangan leterpeton: “Mi, fratino de Ivan A., pereinta bulgara suboficiro, petas vin esplori pri lia tombo”.

Aŭtomobilo rapidis al ĉelima kroata vilaĝo. Bela kamparo, verda oazo apud la lazura kaj malsovaĝa rivero. La loka paroĥestro amike akceptis lin. Post longa interparolo, foliumado de la malnovaj kronikoj, nenie eĉ vorteto pri sangaj bataloj en la proksimaj tranĉeoj. Surloke de la iama buĉejo nenio imagigas la eventojn el la fora pasinteco. Nur fojfoje la infanoj trovas kuglingon el tiu tempo. Eble tiun kies kuglo trafis la koron de la dekestro Ivan. Neniu scias, eĉ neniu serĉas respondon pri tiom bagatela afero. La paroĥestro invitis la solan vilaĝanon kies memoro estis sufiĉe freŝa, por rakonti la veron. Li estis junulo kiu per ĉaro transportis la la

militviktimojn. El lia buŝo la historio malvolviĝis malrapide sed bildoriĉe, preciza kiel bajonettrafo en la kolon de Hans. Post tiu rakonto, la fratino de Ivan ricevis respondon: la ostoj de la pereinta bulgara bravulo, jam delonge kuŝis en iu komuna tombo en Bulgario. Neniu sciigis ŝin pri tio.

Pri Hans neniu demandis. Lia familio pereis en sia domo, provante trovi eskapon antaŭ falantaj bomboj.

Preterfluas daŭre Elba kaj Drava. Iliaj muĝaj kaj ŝaŭmantaj akvoj, kvazaŭ simboloj de senreveno, rakontu tiun ĉi historion al la tuta mondo. Atente aŭskultu ĝian instruon ...

22. 08. 2005.

LEGU PLI PRI JAPANIO

 Raita Pyhälä

HORI Jasuo: "Raportoj el Japanio 10"
Libroteko Tokio, 2007

184 paĝoj, prezo 11,20 eŭroj

mendebla ĉe hori-zonto@water.sannet.ne.jp

Aperis jam la deka kolekto de raportoj el Japanio. En la unuaj naŭ la aŭtoro malofte montris siajn opiniojn pri la aferoj, kiujn li pritraktis, dezirante nur plialtigi sian lingvan kapablon kaj konatigi Japanion al esperantistoj. En la deka kolekto li pli malferme montras sian vidpunkton. Kvankam kelkaj aferoj en Japanio iĝis malagrablaj al li, li ĉiam esperas pacon kaj interkompreniĝon, defendas la homecon. Inter la temoj de Hori videblas diversaj flankoj de la japanaj socio, edukado, politiko, sed ankaŭ de ĉiutaga vivo, pasinto. Liajn eseetojn li ilustras per desegnaĵoj, fotoj, mapetoj kaj statistiko. Se vi deziras konatiĝi kun japaneco, nepre legu liajn raportojn. Sian dekan raportaron li finas per la Esperanta traduko de la kanto Paco Naŭ, kiu naskiĝis en la movado kontraŭ la ŝanĝo de la 9-a artikolo de la japana konstitucio. Tiu artikolo ĝis nun malpermesis al japanoj militon kaj tiel helpis al ekonomia evoluo kaj riĉiĝo de Japanio post la dua mondmilito.

Jen kelkaj aliaj temoj el la 10-a kolekto: manĝobastonetoj kompare kun forkoj kaj tranĉiloj, viktimoj kaj kaŭzoj de Minamata-malsano, beboj fordonitaj de anonimaj patrinoj, vizito al eksa sanatorio de lepruloj, postdrinka stirado. La legaĵoj estas ne longaj kaj la lingvo estas normala Esperanto senerara. Ofte, tamen, Hori uzas ankaŭ japanajn vortojn, kies enhavon li poste klarigas per Esperanto. Japanaj pladoj kaj kulturaĵoj ne povas esti pritraktaj sen japana lingvo. Tiel ja rilatas ĉiu kulturo kun sia lingvo.



MONUMENTO HONORE AL JOACHIM GIEßNER

Thomas Sandner,
komisiono por publikaj rilatoj de la Germana
Esperanto-Asocio

Memormonumento honore al la elstara kaj multtalenta Esperanto-pioniro Joachim Gießner estis solene inaŭgurita la 30-an de junio en Herzberg. Mintrajna vagoneto kun tabulo, sur kiu surestas dulingva etbiografio memorigas pri Joachim Gießner kaj lia 50-jara aktiva agado. Krome nova ŝildo malantaŭ la vagoneto bonvenigas la alvenintojn en "Herzberg – la Esperanto-urbo". La Herzberg-a fervojisto kaj estro de la fervoja stacidomo Gießner (1913-2003) dum multaj jaroj estis prezidanto de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), kaj de 1968 ĝis 1990 li estis prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Li ankaŭ estas tre konata pro sia ampleksa traduka laboro, ĉefe de kantoj. La solenan inaŭguron ĉeestis inter aliaj: la urbestro de Herzberg Gerhard Walter, la prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) Achim Meinel, s-ro Pätzold de la sociala fervojista fondado „Stiftung Bahn-Sozialwerk“, Ulrich Matthe kiel muzikisto kaj amiko de Joachim Gießner - kiu festparolis pri lia elstara traduklaboro,

GEFA-prezidinto Rolf Terjung (kiu kolektis la mondonacojn de la membroj de GEFA kaj IFEF por la monumento). La du novaj Esperanto-objektoj en la antaŭ-stacidoma parko en Herzberg estas du el multaj signoj, ke Esperanto vere iĝas videble en la Esperanto-urbo Herzberg. Dum la venontaj monatoj la urbo preparos 11 belajn bonvenig- respektive revidsalutajn ŝildojn en Esperanto ĉe la enirvojoj al Herzberg. Por 2008 kvar grandaj blukoloraj oficialaj urboŝildoj kun la teksto: "Esperanto-Stadt Herzberg" ("Esperanto-urbo Herzberg") estas planataj ĉe la stacidomaj kajoj. Esperantlingva urboprospekto estas preparata kaj kvar diverstipaj Esperanto-bildkartoj pri Herzberg baldaŭ aperos. Krome, la manĝokartoj de 20 restoracioj en Herzberg estas aktuale esperantigataj. La urba konsilio de Herzberg decidis la 11-an de julio 2006, ke Herzberg oficiale portos la kromnomon "Herzberg – die Esperanto-Stadt" / "Herzberg – la Esperanto-urbo". Ekde multaj jaroj Esperanto-renkontiĝoj kaj -aranĝoj okazadas en Herzberg, kiuj altiras multajn esperantistajn gastojn. Tie troviĝas la Interkultura Centro Herzberg (ICH), la centra klerigejo de la Germana Esperanto-Asocio kaj sidejo de la germana sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), krome la oficejo de la Esperanto-societo Suda Harco, kiu ligas esperantistojn de la regiono. Esperanto estas instruata en ĉiuj lernejoj de Herzberg. Esperanto ankaŭ estas oficiale uzata kiel pontlingvo en la rilatoj kun la pola ĝemelurbo Góra kaj ebligas senperan komunikadon inter la loĝantoj de Herzberg kaj de Góra.



*La nova monumento honore al Joachim Gießner en Herzberg post la inaŭguro,
la 30-an de junio 2007*



Karaj zagrebanoj,
En via nova periodaĵo (gratulon!) en la C.O. mi jam legis la problemon. Estas plorinde, ke kelkaj samideanoj, mem laŭdinde aktivaj, malmulte povas kunlabori. Ĉu eblus repaciĝo? Kondiĉojn vi mem pripensu, intertraktu. Necesas ia “kunviva maniero” (modus vivendi). Dume mi atentigas vian opinion, ĉar Landaj Asocioj estas integra parto de UEA. Kore,

Rob Moerbeek (Roterdamo, Nederlando)

Mi dankas vin pro la sendo de “Zagreba Esperantisto”. Mia filo jam legis hodiaŭ grandan parton de ĝi!... Ĝi aspektas bona revuo. Ankaŭ la eksteraspekto estas alloga. Due, mi tre ĝojas pro la aperigo de miaj humuraĵoj. Mi ankaŭ ĝojis legi la enkondukon, invitantan la legantojn aliĝi al mia listo. Sed bedaŭrinde okazis eraro: la retadreso, kiun vi menciis (judahumuro@rido.net.il) ne estas vera. Ĝi estas fikcia retadreso... Mi uzas ĝin nur kiel “titolon” kiu akompanas la mesaĝojn. La vera listo estas ja kaŝita (BCC)! Tial okazos nun, ke eble kelkaj legantoj sendos mesaĝon al tiu ĉi retadreso kaj ne ricevos respondon... Se vi volas, vi povas aperigi klarigon/korekton, ke la ĝusta retadreso estas la jena: jshemer@actcom.net.il

Josef Šemer (Tel-Avivo, Israelo)

Mi kvitancas la ricevon de la nova gazeto “Zagreba Esperantisto”, gratulon por la bela prezento kaj enhavo.

Mario Amadei (Bolonjo, Italio)

Dankon pro la du numeroj, kiujn mi legis kun granda intereso. Sukceson al la nova revuo! Sed kiel vi havas monon eldoni tian koloran revuon, tion mi ne komprenas. Kiam mi vidis la sufiĉe grandan reklamon pri “Arta Lumo” en via revuo, mi ekpensis, ke mi ion raportu pri la festivalo.

Raita Pyhälä (Lestijärvi, Finnlando)

Ne kutime atingas nin novaj titoloj de la Esperanto-gazetoj, do kun granda scivolemo mi profundigis en la 2-an numeron de “Zagreba Esperantisto”, kies dua, julia numero, atingis nin nur antaŭ kelkaj tagoj. Ĉio en ĝi novis por mi, do evidente pozitive impresita pro ĝia formato kaj aspekto mi unuavice volis konatiĝi kun la enkondukita resumo de la redaktoro de tiu ĉi periodaĵo aperonta en la dumonata ritmo. Jam per la unua frazo oni informiĝas, ke antaŭ ol venis tiu ĉi – kiel evidentiĝas je 8 paĝoj pli ampleksa numero – oni sondis la opiniojn per la numero prova. La unuaj gratulaj reagoj, iuj eĉ entuziasmaj venis kaj el Kroatio

mem, ekzemple de Spomenka Štimec kaj Milan Sudec, kaj el eksterlando i.a. de Višnja Branković kaj Nikola Rašić, Birthe Lappena kaj Bardyl Selimi. Ni jam konas la alian periodaĵon el Kroatio, nome la redaktatan de Spomenka Štimec “Tempo”. Kia estos “Zagreba Esperantisto”? Baze de la redaktoraĵo eksplikoj ni ricevas la respondon, ke multan spacon oni dediĉas “al niaj aktivuloj, al homoj kiuj paciencas kaj formike laboras por bono de Esperanto, sed pri kiuj ni malofte scias”. Sed krome: “Ni volas prezenti ankaŭ tekstojn, kiuj ne tute rilatas al Esperanto, sed estas interesaj, aktualaj kaj legindaj. Influis nian starpunkton la konstato, ke Esperanto estas la sola lingvo, en kiu 99-procente oni verkas ekskluzive pri Esperanto mem. Necesas ŝanĝi tiun rekordon kaj montri al la publiko, ke en Esperanto oni povas verki kaj publikigi ankaŭ pri tute aliaj, ĉiutagaj temoj, sciencaj kaj aliaj aferoj” – fino de la citaĵo. Nu, tio estas evidenta afero, kvazaŭ eŭfemisma, praktikata kaj de la publikaj Esperantlingvaj radioelsendoj, ja ankaŭ de iuj Esperantlingvaj periodaĵoj. Kompreneble la redaktoro deklaras tiun opinion de sur la platformo de loka movado - Zagreba Esperanto-Ligo, kiu daŭre havas la taskon en sia medio pruvi kaj konvinki. Kaj efektive, konforme al la klarigoj de la redaktoro, Radenko Milošević ni trovas eksterordinare riĉan kaj varian numeron, el kiu ni ekscias i.a. pri la jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo, inkluzive de la kreiĝo de ZEL, valoraj arkivaj dokumento-donacoj, gravaj por nia movado, sed ankaŭ pri bedaŭra sorto de la kolekto de Tibor Sekelj, kiun rifuzis akcepti la urbo Subotica. Bonŝance ĝi trovis sian lokon en alia kroata (*noto de ZE: vojvodina urbo; Senta troviĝas en vojvodina parto de Serbio*) urbo Senta. Ni multe ekscias ankaŭ pri la doĵenoj de la kroata Esperanto-movado. Al kelkaj estas dediĉita aparta atento kiel ekzemple al Tomislav Karlović, esperantisto kun fierinde longa esperantista staĝo, 70-jara, fondinto kaj aktivulo de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj. Kompreneble tiuj temoj aperas interalie. Same kiel en la temaro traktita peresperante ni povas sole menciigi interalie tre interesan informon pri la sukceso de kroata sciencisto, sub kies gvido en usona sciencista instituto oni prilaboris la teorion pri la sendrata transmisio de energio. Tio koncernas la nunon. Se temas pri la pasinteco, verŝajne nur malmultaj el ni scias, ke fontoplumo – skribilo iom antikveca, sed nun ankaŭ snobe moda estis inventita de zagrebano. Tamen ne eblas kaŝi, ke kvar unuajn paĝojn okupas en “Zagreba Esperantisto” nun tre aktuala temo, ligita kun la kandidatigo de Marija Belošević por la posteno de UEA-estrarano.





Tio elvokis akrajn reagojn. La redakcia kompilo spegulas la diskuton kaj opiniinterŝanĝon, ankaŭ retan ne sole inter la kroataj esperantistoj. ZE publikigas dokumentojn, direktitajn ĉi-rilate al UEA-komitatojn, komunan deklaron pri E-organizo en Respubliko Kroatio, retan leteron de Radenko Milošević al Marija Belošević kaj oficialan starpunkton de Kroata Esperanto-Ligo. Laŭ la redaktoro la kantidatigo ne sole "incitis la kroatan esperantistaron", sed la retaj diskutoj, anoncas potencialan krizon de UEA. Nu, preventi la krizon kaj ekspliki diversajn dubojn ĉirkaŭ la afero ŝajnas esti aparta defio por UEA-Komitato post kelkaj tagoj ekdebatonta en Jokohamo. Mi ne dubas, ke la afero same kiel incitis, ankaŭ malincite estos raportita en la septembra numero de "Zagreba Esperantisto", pri kio jam komencis labori la redakcia teamo de la nova Esperanto-periodaĵo.

Pola Radio (Varsovio, Pollando) la 31-an de julio 2007.

Mi deziras informi vin, ke hodiaŭ mi bonorde ricevis du ekzemplerojn de la revuo "Zagreba Esperantisto". Trarigardinte ĝin, mi vidis ke en ĝi abundas informoj interesaj ne nur por zagrebanoj kaj kroatoj, sed ankaŭ por aliaj legantoj.

Viktor Galeski (Prilep, Makedonio)

En Maribor mi ricevis du numerojn de via nova revuo. Mi mencias ĝin en venonta numero de 'Horizontaal', revuo de Flandra Esperanto-Ligo. Ne forgesu ankaŭ konigi ĝin ĉe <http://gazetejo.org/>

Roland Rotsaert (Brugge, Belgio)

Kun granda intereso mi tralegis la unuajn du numerojn de "Zagreba Esperantisto", kiujn mi trovis en la kongresejo.

Janko Štruc (Maribor, Slovenio)

En la jaro 1985/86 Marija Belošević kun mi (Julijana Rusić), kaj 20 aliaj esperantistoj (sen vi, sinjoro Tišljar) el eksa Jugoslavio, partoprenis dum du jaroj prelegojn de prof. d-ro Szerdahelyi el Hungario en Ljubljana Universitato pri jenaj fakaj sekcioj: Esperanta gramatiko, historio, literaturo kaj metodiko. Finfine ekzameniĝis sukcesplene dek personoj, antaŭ la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI. Samtempe kun mi diplomiĝis sukcesplene ankaŭ Marija Belošević. La diplomitaj personoj rajtas uzi la titolon dipl. IPE (Internacia Diplomita Pedagoĝo de Esperanto). Pri tio vidu la kunsendatan dokumenton.

Julijana Rusić (Osijek)

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTO-INSTRUISTOJ
DIPLOMO PRI INTERNACIA PEDAGOGIA ESPERANTO-EKZAMENO

Julia RUSIĆ

naskiĝis: 22. 6. 1941 en: Subotica

ekzameniĝis sukcesplene antaŭ
La Internacia Ekzameno-Komisiono De ILEI
en jenaj fakaj sekcioj

Gramatiko
Historio
Literaturo
Metodiko

Disertacio

"Komparo de originala verko "En tradicio de 1^a klaso"
de Imre Madach kun esperanta traduko de Kálmán Kalocsay"

La komisiono aljuĝas jenan klasifikacion

4 - B O N A

La diplomito rajtas uzi la titolon:
internacia-diplomita Esperanto-pedagoĝo
mallonge: Dipl. IPE.

Ljubljana, la 22-an de novembro 1986

komisionano komisionano

komisionestro

Noto de la redakcio:

Pri la sendita dokumento kaj la titolo Dipl. IPE ni petis detalan klarigon de ILEI, je kio venis respondo de s-ano **Atilio Orellana Rojas**: "Bedaŭrinde vi sendis vian peton pri informoj rilate al tiuj diplomoj en momento, kiam mi estas forironta pro laboro (kursoj, kongresoj, ktp) kaj ne povas liveri al vi precizajn informojn ĉirilate. Tion mi povos fari fine de aŭgusto-komence de septembro." Ĝis la momento de finredakto de nia 3-a numero, la promesita klarigo ne venis.

Kopion de la mesaĝo sendita al ILEI, ni sendis ankaŭ al s-ino **Marija Belošević**, kiu ne respondis. Kopion de la diplomo ni sendis al s-ro **Zlatko Tišljar**, kiu komentis la aferon dum restado de niaj redakcianoj en la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. Li menciis, ke la titolo Dipl. IPE estas interna titolo de ILEI, neniel komparebla kun la universitata diplomo, kion la ekstera mondo ne povas kompreni sen aldona klarigo.

La kopion de la diplomo kaj demandon pri ĝia valoro ni sendis ankaŭ al **Nikola Rašić**, kiu estas unu el la subskribintoj. Lia respondo pro la ferioj venis senpere antaŭ finredakto de ĉi-tiu numero. Bonvolu legi kompletan tekston de lia mesaĝo en la artikolo "Pri la valoro kaj karaktero de ILEI-diplomo de la Ljubljana kursoj" (paĝo 68).

Filatela angulo



150 JAROJ POST NASKIĜO DE ANDRIJA MOHOROVIČIĆ

Kroatia poŝto eldonis poŝtmarkon dediĉitan al fama kroata fizikisto Andrija Mohoroviĉić, okaze de la 150-jara jubileo post lia naskiĝo. La poŝtmarkon desegnis Hrvoje Šercar, grafikisto el Zagrebo. Ĝia grandeco estas 28,82 x 48,28 mm, presita en multkolora ofseta preso. Ĝia nominala valoro estas 5 kunaoj. Unu-ataga koverto portas la daton 23-a de aprilo 2007.

Por via albumo



Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj en Njeguš

 Milivoj Lozovina



Hrvatski savez za esperanto - Kroata Esperanto-Ligo

**STOLJETNICA HRVATSKA
ESPERANTO
CENTJARIĜO KROATIO
1908-2008**



Afiŝo per kiu kroataj esperantistoj reklamas la centjaran jubileon en 2008.

Design/dizajno: Hrvoje Šercar